

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La plej juna
katedrestro en
Amsterdamo**

**15-a *Influo*:
Rebatoj de
inform-aktivuloj
al Golden**

**Esperanto peras
inter koreoj kaj
japanoj**



Kien post la postmoderno?

Enhavo

- 181 Interlingvistiko: "Lingvo kiel tia ne ekzistas" (intervjuo kun d-ro Marc van Oostendorp)
- 182 Kampanjo 2000: Moderno kaj postmoderno en nia kulturo (Mark Fettes)
- 184 Kandidatigu komitatanojn B de UEA!
- 185 Kongresa Komunikado 1 de la 83-a Universala Kongreso en Montpeliero
- 186 Scienco: Scienca edukado en Esperanto (Amri Wandel)
- 187 Someraj aranĝoj: Aŭdienco papa kaj prezidenta (Carlo Sarandrea); Unika perado historia (Nisio Tutomu); OSIEK donis helenan influon (Johano Rapley); Serve al SERVAS (Francisko Randin)
- 189 Speciala sekcio: *Influo* numero 15
- 193 Kalendaro 1997-98
- 194 Belartaj Konkursoj de UEA en 1998
- 195 Laste aperis
- 196 Recenzoj: *Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj* (Miroslav Malovec); *Internacia familio — utopio aŭ realaĵo?*, *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo* (Kalle Kniivilä); *Teatra vespero de Vida Jerman* (Ivo Borovečki)
- 197 Teatro: Egalrajte en du kulturoj (Vida Jerman)
- 198 Persone – Loke – Fake
- 199 Anoncetoj
- 200 Nekrologoj: Nguyễn Hải Trùng (1921-1997) Oficiala Informilo

Vi trovos

ĉefartikolon (p.182) kun teorieca titolo kaj rimarkinda amplekso, ecoj eble timigaj por tiuj impete agemaj praktikemuloj kies plej natura agadtereno estas la standoj, budoj kaj ekspozicioj de la Ago-Tago (p.192). Sed kiel ajn oni opiniu pri la imperativoj de la ĉiutaga verda vivo, por ni ĉiuj gravas ja cerbumi kun Mark Fettes: kian pozicion okupu nia movado/komunumo en la nuna mondo? Ni ja fosu nian sulkon — sed ni ne restu senpense tretantaj en sulko ĉiam sama.

Rapida memorigo: post nur kelkaj semajnoj alvenos la Tago de la Libro! Tial en la decembra numero vi renkontos aparte multajn materialojn pri la Esperanta beletro, kaj ankaŭ la furorliston de la libroj venditaj en la Adelajda UK — kiun ne eblis pli frue kompili pro la malrapida ŝipa reveno de la restinta stoko el Aŭstralio.

La kovrilo: Ĉu ni rigardu ĉi tiun aviadilon, kiu preskaŭ tanĝas la tegmentojn de Honkongo, kiel simbolon de tiu monda evoluo pri kiu "ekzistas abundaj kialoj por pesimismo", laŭ Fettes? Nu, ni ankaŭ memoru kun li ke "malpesimismo estas afero de konscia volo, ne de scienca certeco."

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesco)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-652-4488 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

"Lingvo kiel tia ne ekzistas"

Ĉe la Universitato de Amsterdamo ekfunkcias profesoro pri interlingvistiko kaj esperantologio: d-ro Marc van Oostendorp. Ni intervjuis lin ĉe lia ĉefa laborloko, la Universitato de Lejdeno.

Vi magistriĝis per tezo pri "La sintakso de lingvo sen gramatiko". Mi kredas diveni pri kiu lingvo temas...

Jes, pri Esperanto. Kompreneble, mi demonstris ke Esperanto havas gramatikon — kaj ke ĝi, planita por esti kiel eble plej logika, evoluigis dum sia historio ecojn unuavide ne logikajn. Sed tiuj ecoj kongruas kun la principoj de la universala gramatiko — t.e. la reguloj kiuj, laŭ la koncepto de Chomsky, universale validas por ĉiuj lingvoj. Do, en pli abstrakta maniero ankaŭ tiuj ecoj estas logikaj.

Via esploro do konfirmas ke Esperanto esence ne malsimilas aliajn lingvojn, ke ĝia "artefariteco" ne gravas...

La temo "artefariteco" ĉiam interesege min. Sed kiel studento mi devis aŭdi ke ni studos lingvojn naturajn; do, ekzemple ne la lingvon de formala logiko aŭ artefaritajn lingvojn kiel Esperanto.

Kiel vi reagis al tiu limigo?

Mi pensis: jen laborkampo por mi! Ekde 13-jara aĝo mi lernis Esperanton. Ĝi spronis mian intereson pri lingvistiko — kaj reciproke. Por mi Esperanto kaj lingvistiko ĉiam havis firman interligon. Tial mi ne povis akcepti la ĉiam saman, nur historian argumenton de la ignorantoj de Esperanto: ke lingvo inventita de unu homo ne povas ekzisti, aŭ ke ĝi ankoraŭ tro junas

por serioza konsidero. Mi ŝatas provoki ilin per la ideo: kio se iam oni malkovrus ke la nederlanda lingvo estis elpensita de iu en la 13-a jarcento? Ĉu ni trovus ĝin pro tio malpli natura? Kaj, fakte, la nederlanda ja estas iu-grade artefarita, ĉar sen la influo de la




Foto: Martine Dhondt

vaste legita Biblio-traduko ("artefaritaĵo") ĝi ne ekzistus en sia nuna formo. Aliflanke, se ni asertas ke Esperanto estas natura, kio malhelpas nin aserti same pri Volapuko, Interlingua ktp; kie estas la limoj de natureco?

Laŭ via sperto: ĉu E-o defias la kutimajn pensokadrojn de lingvistoj?

Ne, almenaŭ ne la kadron en kiu mi laboras. Laŭ la Chomsky-a skolo, al kiu mi apartenas, lingvo kiel tia fakte ne ekzistas; ekzistas parolantoj de diversaj sistemoj, ĉiu de sia propra, kiuj diversgrade komprenas unu la alian.

Ĉu vi mem verkas en Esperanto?

Mi ŝatus verki "posteulon" al la tre bona, sed post 20 jaroj ne plu ĝisdata *Lingvistikaj aspektoj* de Wells. Ĝi similas al mia verko *Tongval — Hoe klinken Nederlanders?* ("Dialekto — Kiel sonas nederlandanoj?"), en kiu mi klopodis popular-stile kaj interese rakonti pri lingvistikaj faktoj.

En aprilo startos via kurso pri "Interlingvistiko kaj Esperanto" en Amsterdamo. Kiuj ĝin partoprenos?

Rajtas ĉiu studento (kaj, pagante 350 gld., ankaŭ eksteruloj), sed probable plej interesiĝos studentoj pri lingvistiko kaj pri eŭropaj studoj. Tial ke la ĉefa celo ne estas krei E-parolantojn, sed altigi la interlingvistikan scion, mi donos ne lingvokurson, sed kurson pri lingvo: pri la ideo de internacia lingvo, pri la strukturo de E-o ktp.

Laŭ la posten-anonco, vi ankaŭ "plenumos kaj gvidos esplorojn".

Jes, mi interesiĝas pri la propedeŭtikeco de Esperanto. Mi ankaŭ jam kontaktis Corsetti kaj Hiroshi

pri ilia psikolingvistika esploro [vd. p. 199]. Sed mi ĉefe ŝatus ekscii kia estas la efektive uzata Esperanto. Tial mi planas starigi korpuson de norma Esperanto: unuapaŝe de la skriba lingvo, tamen ne de la polurita lingvaĵo.

Oni rimarkis ke vi estas la plej juna inter la Amsterdamaj profesoroj.

Tio estas tre provizora merito.

Vi estas sciencisto, ne movadano. Ĉu polusoj ne proksimigeblaj?

Nu, similan antagonismon mi spertas kiel redaktoro ĉe la revuo *Onze Taal* [vd. maldekstre]; opinio de lingvisto povas malplaĉi al purisma leganto, kiu "batalas" por "pura" nederlanda lingvo. Aperas ideoj starigi akademion pri la nederlanda lingvo, sed mi ne ambicias iĝi akademiano, nek pri la nederlanda nek pri Esperanto.

Kaj kion vi ja ambicias?

Kion ĉiu sciencisto: ricevi respondojn al miaj demandoj. ★

Marc van Oostendorp estos renkontebla en la Malferma Tago de la Centra Oficejo (vd. p. 186).

Marc van Oostendorp

Nederlanda lingvisto, fonologiisto, van Oostendorp (1967) bakalaŭriĝis en Lejdeno (1987), magistriĝis (1991) kaj doktoriĝis en Tilburg (1995). Liaj libroj, artikoloj kaj prelegoj tuŝas temojn tiel malsamajn kiel fonologio, lingvopolitiko, poetiko kaj komputiko. Li estas redakciano kaj TTT-prizorganto de *Onze Taal* ("Nia lingvo"), revuo de samnoma asocio, kleriganta laikojn interesatajn pri demandoj de la nederlanda lingvouzo. Li kunprizorgas la projekton Laurens Jansz. Coster, kiu celas senpage disponebligi per Interreto nederland-lingvajn beletrajn tekstojn senkopirajtaj kaj ekspluati la specifajn eblojn de hiperteksto por ilia prezento (<http://www.dds.nl/~ljcoster/>).

Moderno kaj postmo

La ĉi-suba teksto baziĝas sur la referaĵo kiun Mark Fettes faris en la Esperantologia Konferenco dum la 81-a UK en Prago (25 julio 1996).

La epoko kiam naskiĝis Esperanto estis karakterizita de grandaj teknikaj kaj sociaj ŝanĝoj. La disvastiĝo de fervojoj tra Eŭropo, la invento de la poŝta sistemo, la elektra lampo, la telefono, la fototekniko, la unuaj plastoĵoj kaj ĉiuj aliaj novaĵoj ligitaj al la rapida antaŭeniĝo de la Industria Revolucio ŝajnis simple konfirmi la ideon ke la socio evoluas en unu direkto, al pli kaj pli granda povo super la naturo kaj super la homa sorto.

Tiu ĉi ideo estas la kerna trajto de la *moderneco*. Mi uzas la vorton ĉi tie en teknika sociologia senco: la moderneco estas la socia klopodo venki la malsanecojn de la homa vivo. La moderna scienco, ekzemple, strebas al certeco pri kaŭzo kaj rezulto: se ni faros tion, sekvos jeno. La moderna medicino strebas al certeco pri sano: se ni faros tiel kaj tiel, ni estos sekuraj kontraŭ malsano, eĉ (provizore) kontraŭ morto. Kaj la moderna ŝtato strebas al certeco pri identeco: se ni plenumos tiun aŭ tiun rolon, la socio kompanse donos al ni ĉion necesan por bone vivi.

Certeco postulas informojn. Informoj bezonas analizon. Tiel la nova koncepto de ŝtato en kiu ĉiuj civitanoj ĝuas samajn, garantiitajn rajtojn kompanse por sia kontribuo al la komunaj sociaj strukturoj, heroldis la inventon de la sociologio. "Socio", en la moderna sociologio, signifas fakte "ŝtato" aŭ "ŝtata loĝantaro". La sociologio estis elpensita por helpi al la administrado de ŝtatoj, per kolektado de informoj (por kio oni devis evoluigi tute novajn esplorteknikojn) kaj por krei teoriajn skemojn helpe al la certigo de ŝtata identeco. La sociologio fakte starigas modelojn de ideala socio (ĉar ĉiuj modernaj sciencoj idealigas), kaj tiujn modelojn la ŝtataj potencoj ofte akceptis kiel sian celon.

Moderneco kaj lingva diskriminacio

En tiuj modeloj la lingvo kompreneble ludis rolon. Homaj socioj ne estas nature unulingvaj: dialektoj povas diferencii de vilaĝo al vilaĝo, kaj diverslingvaj vilaĝoj aŭ vilaĝaroj kunekzisti intermiksita en pli granda regiono. Sed la lingva diverseco metas grandan defion al la administrado de moderna ŝtato: unue, ĉar la ĉasado de la certeco postulas skribajn registraĵojn, kaj skribo postulas lingvan normigon, minimume, se ne kompletan lingvan unuecigon; kaj due, ĉar lingvoj peras kulturan kaj komunikan apartecon, kiu ne estas facile kontrolebla kaj regebla laŭ la ideala sociologia modelo de socio en kiu ĉiuj estas egalaj. Tial unu el la trajtoj de la moderneco estas la lingva diskriminacio, kiu donas al la parolantoj



Lokaj identecoj ne malaperas, nur iom aliĝas, en la (post)moderna mondo. Jen fekunda grundo por konstrui "vivsistemojn sufiĉe bonajn", "kvazaŭutopiojn" kiel Esperanto – asertas Mark Fettes.

de la nacia lingvo ĉiujn rajtojn kaj al la parolantoj de aliaj lingvoj neniujn rajtojn.

La socia moderniĝo en Eŭropo ekis en okcidento dum la 17-a jarcento, gajnis impeton dum la sekvanta klerisma epoko, kaj faris grandan antaŭensalton per la franca revolucio fine de la 18-a jarcento. Kiam Zamenhof naskiĝis, duonan jarcenton poste, la tajdo de moderna jam konkeris la eŭropan menson. Tio estis la periodo en kiu ekformiĝis la plimulto de la modernaj ŝtatoj, eĉ se kelkaj el ili ne formaliĝis ankoraŭ dum kelkaj jardekoj. Ĝuste en la grandaj orientaj imperioj de la Romanovoj kaj Habsburgoj la moderna epoko komenciĝis malfrue. En Bjalistoko, kiel vi scias, regis nur duonmoderna lingva imperiismo: tie la rusa superis kaj la jida malsuperis, kun la germana kaj la pola ie meze; sed ankoraŭ ne venis la tempo kiam regna lingvo, kiel dirus Zamenhof, komplete forviŝus la aliajn lingvojn el la stratbildo.

Kvazaŭmoderno

Por Zamenhof, do, kaj supozeble por la multaj aliaj E-pioniroj en la Cara Imperio, eblis koncepti Esperanton en la kadro de lingvo-ekologio nur kvazaŭmoderna. Kiel Zamenhof skribis en la Unua Libro, neŭtrala lingvo estas ideala kandidato por la rolo de "lingvo regna kaj societa",

derno en nia kulturo



dum la diversaj lingvokomunumoj povus daŭre konservi siajn lingvojn por “la doma vivo de la popoloj”. Jen do la konata bildo de moderna unulingva ŝtato, sed ŝtato multe pli akceptema al lingva kaj kultura diverseco ol tion antaŭvidis la sociologoj kaj ideologoj de l’ modernismo.

La fama socilingvisto Joshua Fishman aperigis studon antaŭ kelkaj jaroj en kiu li montris ke tia toleremo, aŭ eĉ simpatio, al lingva kaj kultura diverseco havas longan historion en centra kaj orienta Eŭropo, dum ĝi jam frue komencis malaperi en okcidento. Eblas rigardi ankaŭ Zamenhof kaj Esperanton kiel produktojn de tiu tradicio; aŭ, pli precize, de ties konfrontiĝo kun la moderniga tajdo. Kiam alruliĝas cunamo, necesas digoj. Esperanto estis urĝe bezonata alternativo al jam antaŭvidebla evoluo: naciismo, etna purigo, teritoriaj militoj, kaj la fino de kelkjarcenta kulturo de kunvivado. Ni scias kio okazis. Se hodiaŭ vi iros al Bjalistoko, vi trovos tie post-cunaman scenon, urbon esence unukulturan kaj unulingvan.

Modernismo

En okcidenta Eŭropo, la ideo de lingvo “regna kaj societa” apenaŭ ŝajnis aktuala: tie la naciaj lingvoj jam survojis al definitiva venko super la senŝtataj minoritataj lingvoj. Sed jam sentiĝis alia problemoj, la manko de vaste parolataj lingvoj por interŝtata uzo. La malkovro de Esperanto fare de la francaj propagandistoj enkondukis plene modernisman periodon en la Esperanto-movadon, aŭ almenaŭ en ties ideologion. Nun al la ideala unulingva ŝtatmodelo aldoniĝis idealo pri superŝtata lingvo. Por iuj

ĝi estu senkultura, senhistoria, plenumonta pure teknikajn bezonojn. Por aliaj ĝi havu ja kulturon, sed nur tian kiu konvenas al ĝia rolo: lingvo de burĝa demokratio, por apogantoj de tia socimodelo; lingvo de klasa revolucio, por aliaj. Sed por ĉiuj gravis iu moderna idealo, iu universala bildo kiu finfine certigus la lingvan kaj kulturan identecon de ĉiuj. Mi emfazu ĉi tie: la ideologia debato inter komunismo kaj kapitalismo okazis surbaze de plena samopinieco pri la moderna estonteco de l’ homaro. Temis nur pri la plej konvena, aŭ historie necesa, maniero atingi tiun idealon.

La ideologio de l’ moderno longe regis en la Esperanto-movado. Ĝia apogeo eble estis la modelo tiel fervore propagandita de Ivo Lapenna: loka lingvo por lokaj bezonoj, nacia lingvo por enŝtata uzado, kaj superŝtate la “lingvo de la internacieca humanismo”. Kaj la rimedo por venkigi tiun modelon estis movado ĝuste tiel strukturita, kun lokaj kluboj sub landaj asocioj (po unu en ĉiu ŝtato), kaj kun tiuj ĉi asocioj grupigitaj kaj voĉdonrajtaj en internacia organizaĵo. Do, vi vidas: kaj la modelo kaj la strukturo kongruas perfekte unu kun la alia kaj kun la idealoj de l’ moderno.

La postmoderna epoko

Dum la florperiodo de la moderneco, preskaŭ ĉiuj akceptis ĝin ne kiel idearon sed kiel fakton pri la mondo, kvazaŭ scienca leĝon pri la homa evoluo: evoluo al pli da scio, pli da povo, pli da certeco, al mondo funkcia pli kaj pli laŭ universalaj modeloj evoluintaj (hazarde) en okcidenta Eŭropo. Kvankam daŭre ekzistis malkonsentoj inter la apogantoj de malsamaj modeloj, neniu vere dubis ke tia modelo ekzistas kaj iam venkos. Eĉ la dua mondmilito ne sukcesis disrompi tiun memfidon; ĝuste la postmilita periodo atestis la plej grandan eksportadon de okcidentaj modeloj al la cetera mondo sub la etiketo “evoluiĝo”. Dubetoj ekdisvastiĝis nur en la sesdekaj jaroj. Iom post iom amasiĝis indikoj ke ne realiĝas la modeloj. Novaj esploroj subfosis la teorian bazon de la moderneco, ekzemple ĝian pretecon oferi ĉiujn lokajn identecojn al la postuloj de mastrumebla socia ordo. Oni ekrimarkis ke fakte ne malaperas tiuj identecoj, ekzemple en la fama usona “kunfandejo”, sed nur iom aliĝas; kaj samtempe parto de la okcidentaj socioj, aparte ĉe la junularo, ekribelis kontraŭ la moderna ordo trudita al ili de la postmilitaj strukturoj. Ĉiuj ĉi evoluoj markis la komencon de la *postmoderna* epoko, kiun karakterizas radikalaj duboj pri la celoj kaj metodoj de la moderneco.

En la Esperanto-kulturo tiuj duboj esprimiĝis unue per la Deklaracio de Tireso (1969), kiu atentigis pri la sufoka efiko de la moderneco ekster la Esperanto-movado, kaj poste per la Manifesto de Raŭmo (1980), kiu turnis tiujn kritikojn kontraŭ la movadon mem. En ambaŭ kazoj ne gravas la preciza enhavo de la koncerna dokumento, sed prefere la signifo kiun atribuis al ĝi aro da movadanoj neniel ligitaj al la origina verko. Tireso forlasis la idealan bildon pri mondo en kiu lingvoj loka, nacia kaj

☞ internacia kunezistas en ŝtate sankciita harmonio, alvokante al la kontraŭbatalo de ĉiuj atencoj kontraŭ lingvaj rajtoj, kaj ĝenerale al pli kritikema rigardo al la ŝtatoj mem. En tiu bildo forestas la fido pri natura evoluo al iu utopia estonteco. Post Tireso tamen restis moderna bildo pri la Esperanto-movado mem: bildo cel-orientita, kun gvidantoj kaj gvidatoj, kun centro kaj periferio. Tiun bildon Raŭmo senkompromise malakceptis, proponante anstataŭe la modelon de “mem elektita diaspora minoritato”, mikrosocio sencentra, en kiu ĉiu ano mem elektas la celon kiun li aŭ ŝi preferas, kaj ĝin realigas eventuale kunlabore kun aliaj, sed sen gvidado de iu movada elito. Tio estas, ĝi proponas ĝuste postmodernan modelon de la Esperanto-movado, aŭ pli ĝuste de la Esperanto-komunumo — esprimon kiu nun pli kaj pli ofte anstataŭas la malnovan.

Mi ne volas argumenti ĉi tie por la plena praveco de la moderna aŭ la postmoderna modeloj; efektive mi opinias ke ambaŭ proponas idealon nerealan kaj nerealegeblan. Tamen eble per kunigo de la du tendencoj ni venos al pli riĉa kaj nuancita bildo pri la Esperanto-kulturo, pri ĝia loko en la mondo, kaj pri ĝia estonteco. Ekzemple, kiom el la agado de niaj landoj asocioj vere kongruas kun la bildo pri moderna movado? Kaj kiom el niaj homoj konsideras la eksterajn, tradiciajn celojn de la movado neglektindaj? En ambaŭ kazoj, nur malgranda procentaĵo, mi pretas veti. Ŝajnas al mi ke Esperanto mem estas fenomeno kvazaŭmoderna, ĝuste kiel en la tempo de Zamenhof; ke tio certigis ĝian travivadon tra ĉiuj flusoj kaj malflusoj de la sorto; kaj ke la nuna epoko de la postmoderneco malfermas novajn perspektivojn por ĝia disflorado.

Kvazaŭutopioj

Ĉar ne vere temas pri postmodernisma epoko: la postmodernismo povas ekzisti nur en la ombro de modernaj strukturoj, ĝi povas kritiki la potencon sed neniam transpreni ĝin — ĉar tiel ĝi fariĝus io alia: plia varianto de la modernismo mem. Se sociologoj parolas pri postmoderneco, ili celas socion en kiu burĝonas kompromisoj kaj streĉitecoj inter modernaj kaj postmodernaj: kie tradiciaj roldividaj malaperas aŭ malklariĝas, kie individua memrealiĝo iĝas vaste agnoskata valoro, kie ŝtatoj ekrezignas pri ĉiomastruma rolo en la ekonomio kaj tiel plu. Mi dirus ke

multaj homoj nuntempe sopiras kaj klopodas konstrui kvazaŭutopiojn: vivsistemojn “sufiĉe bonajn”, kiuj ne postulas por sia funkciado la gigantajn investojn kaj potencajn regcentrojn de la modernisma epoko. Esperanto estas unu tia kvazaŭutopio, kiu kredeble neniam kontentigos ĉiujn, sed kiu ja povos fariĝi nemalhavebla por multaj.

Mi diras: povos, ĉar mi ne volas aperi ĉi tie kiel modernisma profeto. Ekzistas abundaj kialoj por pesimismo, ne nur pri Esperanto, sed pri la tuta monda evoluo. Malpesimismo estas afero de konscia volo, ne de scienca certeco. Tamen, se vi akceptos malpesimismen kun mi, ni kune konsideru kion la jam skizitaj ideoj signifas por nia movada strategio. Evidente ili ne kongruas kun la perspektivo de *Esperanto en perspektivo*! Ekzemple, malgraŭ sia daŭre tre grava kaj influa pozicio en la movado (aŭ komunumo), nia monda asocio devas vole-nevole rekoni la plurecon de la Esperanto-komunumo — la fakton ke esperantistoj povas tute bone vivi sen UEA, aŭ elekti nur tiujn el ĝiaj servoj kaj agadoj kiuj plaĉas al ili kaj ignori la ceteron. En la loko de la ŝtate inspirita analizo de Ivo Lapenna, ni konstruu klarvidajn merkatan kaj sisteman analizojn pri niaj fortoj kaj malfortoj. La politika ekonomio kaj kultura ekologio de Esperanto fariĝu esplortemoj de niaj intelektuloj kaj bazaj konceptoj en nia planado.

Merkato por ideoj

Kvankam ĉi tie estas nek tempo nek loko por komencian planadon, mi ne povas preterlasi lastan konstaton. Bazi sian strategion sur merkata analizo de la esperantistaro ne signifas cedi al vulgara materialismo. Ja ankaŭ por ideoj ekzistas merkato, eĉ por strategioj kaj kampanjoj ekzistas merkato! La sukceso de la Manifesto de Prago estas konsiderenda kiel merkata trafo. Ni esperu ke venos multaj pliaj, ankaŭ ekster la Esperanto-komunumo.

Mark Fettes

MENCIITAJ VERKOJ

- Bauman, Zygmunt. 1992. *Intimations of Postmodernity*. London: Routledge.
Fishman, Joshua. 1982. *Whorfianism of the third kind: Ethnolinguistic diversity as a worldwide societal asset*. *Language in Society* 11, 1-14.
Lapenna, Ivo, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. 1974. *Esperanto en perspektivo*. Rotterdam: CED.

Kandidatigu komitatanojn B de UEA!

1998 estos elektoj en UEA, kaj tio ebligas provizi ĉiujn organojn kaj funkciojn de la Asocio per novaj kaj freŝaj agantoj. Parto de tiu procezo estas elekti la komitatanojn B, per skriba voĉdono de la individua membraro de la Asocio. Laŭ la Statuto (art. 24) **eblos elekti 8 komitatanojn B**. La Ĝenerala Regularo (art. 8) preskribas jenajn regulojn:

“Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la propo-

noj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksas maksimume 150 vortojn.”

Kompletaj proponoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo antaŭ la 15-a de februaro 1998.

Ĉiu kandidato devas esti individua membro de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (1996 kaj 1997) kaj kompreneble kotizi ankaŭ por 1998. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas

esti komitatano. Jama komitatano estas reelektebla kondiĉe ke li aŭ ŝi en la periodo 1992-97 ĉeestis almenaŭ unu komitatkunsidon. Memoru tamen ke la elektoj donas ŝancon alporti freŝajn laborfortojn kaj ideojn al la Asocio.

Se la nombro de kandidatoj ne estos pli ol ok, oni konsideros ilin ĉiujn elektitaj. Se la kandidatoj estos pli multaj, ĉiu individua membro ricevos voĉdonilon en aprilo 1998.

Uzu vian demokratian rajton rekte reprezentiĝi en la supera gvidorgano de UEA!

OSMO BULLER
Ĝenerala Direktoro



83-a Universala Kongreso de Esperanto

Montpeliero (Francio)

1-8 aŭgusto 1998

Konstanta adreso

UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Kongresa Temo

Sub la kunordigo de Renato Corsetti (Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio), la temo "Mediteraneo — ponto inter kulturoj" ebligos pli bone kompreni la kulturon de la mondregiono kie la kongreso okazas — kaj ankaŭ esplori la rolon de nia specifa interkultura ponto, Esperanto.

Unua kaj Dua Bultenoj

La vaste dissendita Unua Bulteno estas nun preskaŭ elĉerpita, do se vi bezonas pli, bv. mendi plej baldaŭ. La Dua Bulteno aperos en decembro, kun i.a. detala oferto de loĝ-ebloj, ekskursoj, antaŭ- kaj postkongresoj. Ĝin ricevos ĉiuj aliĝintoj.

Glumarko, Afiŝo

La moderna glumarko de Bernard Legeay (vd. la dors-kovrilon) spertis jam tri represojn. Ĝi estas daŭre

mendebla ĉe la Libroservo de UEA, same kiel la tre populara, grandformata (A1) kolora afiŝo de la UK (6,90 gld.).

Vizoj, invitiloj

Ĉar Francio proceduras tre strikte pri enirvizoj por loĝantoj de (precipe) triamondaj landoj, konsilindas kontakti frue ĝiajn konsulejojn por esplori kio estas bezonata por prezenti vizpeton. LKK kaj UEA sendos oficialajn invitleterojn nur al la jam aliĝintaj kongresanoj, kaj ne eblas fari deklarojn pri financa garantiado. Oni memoru ke kongresa kotizo ne estas repagebla, sen konsidero al la kialo de nepartopreno.

Loĝado, vojaĝo

En la turisma urbo Montpeliero la sezono pintas komence de aŭgusto. Tial nepre rekomendindas frue mendi hotelĉambron. UEA kaj LKK jam rezervis lokojn en ĉiuj prezkatégorioj. Post la ricevo de la Dua Bulteno bv. rapide certigi viajn lokojn per mendo,

ĉar temas pri limigita nombro. UEA plejparte sukcesis ricevi prezojn pli favorajn ol eblas ĉe aliaj liverantoj. Lokoj en unulitaj ĉambroj de studenta hejmo kostos nur 140 gld. por la tuta semajno!

Bv. frue mendi ankaŭ viajn vojaĝbiletojn! Organizantoj de grupvojaĝoj kontaktu la CO anticipe.

Pri ĉiuj petoj pri loĝado kaj ekskursoj bv. ne skribi al la Regiona Turisma Oficejo, sed prefere al la CO de UEA.

Antaŭkongresoj

En la kvartaga oficiala antaŭkongreso en Parizo oni vizitos la plej famajn lokojn de tiu mirinda metropolo: la avenuo Champs-Élysées, Eifelturon, la muzeon Luvro, la katedralon Notre-Dame ktp. Prezoj: ekde 1200 gld. Alian antaŭkongreson gastigos dum ses tagoj la spirhaltiga alpa regiono de Francio, kies naturo ravas somere ne malpli ol vintre. Prezoj: ekde 1470 gld.

Postkongresoj

La oficiala postkongreso spuros, sudokcidente de Montpeliero, la abundajn postrestaĵojn de la karakteriza kaj admirinda kulturo kiun kreis la adeptoj de mezepoka religia doktrino hereza, la katarismo. Alia postkongreso donos bildon pri la vidindaj Langvedoko, Rusiljono kaj pri regionoj de meza Francio, ĝis Poitiers. Tria postkongreso vizitos la oriente najbaran regionon Provenco, kies same riĉaj naturo kaj historio meritas fundan esploron.

Infana Kongreseto

En la urbeto Sommière troviĝas ideala loko por gastigi ĉ. 60 infanojn paralele al la UK. Kotizo: 450 gld. ĝis la jarfino, 500 gld. ĝis aprilo, 550 gld. poste. Aliĝoj kaj informoj ĉe: Christopher Fettes, St. Columba's College, Whitechurch, Dublin 16, Irlando; ☎+353/1/493-66-55.

Aliĝoj

Ĝis la fino de oktobro aliĝis ĉ. 400 personoj el pli ol 40 landoj.

Kotizoj

Ĝis la jarfino: individua membro de UEA (IM) 225 guldenoj (el B-kategoriaj landoj: 170 gld.); ne-IM — 280 gld (212); komitatano, kunulo, junulo, handicapito kiu estas mem IM 112 (85); ne-IM 170 (128). ★

Scienca edukado en Esperanto

Kiel konkretiĝas la potencialoj de Esperanto kiel lingvo de scienca komunikado? Amri Wandel skizas kelkajn el la jamaj realaĵoj ĉi-kampe.

La rolo de Esperanto en la scienco kaj en la universitata instruado iom paralelas al ĝia rolo en la ĝenerala lingva problemo tutmonda. La nuntempa scienca kaj akademia mondo pli kaj pli uzas la anglan kiel laborlingvon por internaciaj kaj — en multaj kazoj — eĉ naciaj aranĝoj. Tio tamen ofte malhelpas la progreson de la scienco, kiu bezonas liberan interŝanĝon de scioj kaj spertoj sur persona nivelo. Sciencistoj el ne-anglalingvaj landoj ofte spertas la lingvajn barojn provante raporti pri siaj esploroj en internaciaj forumoj. Kontraste, universitata instruado kutime okazas nacilingve: ekzistas do lingva breĉo inter instruado kaj la praktiko labora kaj konferenca. Tiujn malavantaĝojn povas solvi Esperanto kiel internacia komunika lingvo.

IKU kaj AIS

Sur la tereno de scienca edukado en Esperanto elstaras du institucioj, kiuj regule okazigas kursojn kaj prelegojn universitat-lajn: Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). IKU proponas ĉiujare, kadre de la Universalaj Kongresoj, al centoj da aŭskultantoj dekon da prelegoj de spertuloj pri tre diversaj temoj, de komputiko ĝis literaturo, de astronomio ĝis ekonomio. AIS estas fakte la sola Esperanto-universitato. Ĝi funkcias kiel migranta universitato internacia, kun sciencaj sesioj en diversaj landoj, kun diplomoj oficiale rekonataj en pluraj landoj.

AISIKU

En la Tamperea UK (1995) la du institucioj unuafoje kombinis siajn programojn al komuna sesio, la t.n. AISIKU-kursaro, kiam al la kutima programo de IKU aldoniĝis du ok-horaj AIS-kursoj. Ties enkondukaj prelegoj okazis kadre

Aliĝu al lingvistika konferenco

Kiel unu el la ĉeforganizantoj, la konata Cseh-metoda instruistino Katalin Smidélus atingis ke la temoj interlingvistiko kaj esperantologio estu traktataj en unu el la 18 sekcioj de la **8-a Konferenco de Aplikata Lingvistiko**, (16-18 aprilo 1998, Szombathely, Hungario), kies ĉeftemo estos "La lingvo kiel intelekta kaj ekonomia kapitalo". Prelegoj povos okazi ankaŭ Esperante, principe en ĉiuj sekcioj, kondiĉe de taŭge alta scienca nivelo. Se la nova sekcio sukcesos, ĝi povos enprogramiĝi ankaŭ venontjare.

Jen ŝanco kaptenda por altigi la prestiĝon de interlingvistiko. Prelegontoj aliĝu nepre antaŭ 15 jan. 1998. Pliaj informoj: d-rino Katalin Smidélus, Pf. 170, BDFT, Alk. Nyelv. Tanszék, HU-9701 Szombathely, Hungario; ☎+36/94/312-248 (indikante la nomon); ✉smidik@rik.bdtf.hu.

**POR LA TAGO DE LA LIBRO PROVIZU VIN PER
ESPERANTAJ LIBROJ EN LA URBO DE ERASMO**

MALFERMA TAGO

sabaton la 29-an de novembro 1997 (10h00 - 17h00)



★ Paul Gubbins prezentos la televidan serion *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*

★ E-vidbendoj montrataj

★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%

★ Specialaj ofertoj

★ Senkosta loterio

★ Bazaro de esperantaĵoj

★ Kafo kaj teo senpagaj

Loko: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam

de IKU, kaj kongresanoj povis partopreni la ceteran kurson, eĉ ekzameniĝi kaj ricevi ateston de AIS — kion trideko da ili efektive faris. La sukceso de tiu formulo instigis al ripeto en Prago (1996). Tiufoje oni eĉ kombinis la inaŭgurojn de IKU kaj de la AIS-sesio. La komunaj AISIKU-aranĝoj ricevis formalan kadron per kontrakto inter UEA kaj AIS, kiun la senato de AIS subskribis en sia lasta kunsido septembre en Rimini.

IKU-broŝuro

Manke de AIS-sesio en Adelajdo, la IKU tie elstaris pro alia nova iniciato, kiun UEA planas daŭrigi en la venontaj jaroj. Belaspekta broŝuro kun la teksto de preskaŭ ĉiuj IKU-prelegoj estis jam anticipe akirebla en la kongresa libroservo. Tia antaŭdisponigo de tekstoj kongruas kun la praktiko de internaciaj sciencaj konferencoj kaj eĉ ordinaj universitataj kursoj. Tiel la aŭskultantoj povis pli bone sekvi la prelegojn, kaj ankaŭ por forestantoj ekeblis konatiĝi kun la enhavo. Dum la kongreso elĉerpiĝis praktike la tuta stoko de la broŝuro. La tekstoj de la prelegoj restas Interrete konsulteblaj ĉe <http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/adel.htm/>.

AISIKU en Montpeliero

Ni jam invitis (okt., p. 172) prelego-proponojn por la sekva IKU, kun la 15-a de januaro kiel limdato. Ni nun aldonu ke estus utile — por pli bone plani la AISIKU-kursojn — se la proponantoj indikus ankaŭ sian eventualan pretecon prezenti sian temon pli amplekse, pere de 3-4 prelegoj, kadre de AISIKU.

Amri Wandel

Estrarano pri faka kaj scienca agado

Aŭdienco papa kaj prezidenta

Preskaŭ 300 kongresanoj el 23 landoj pilgrimis al Romo kaj Rimini por la 50-a Kongreso (31 aŭg.-7 sep.) de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Jam de pluraj jaroj la katolikaj esperantistoj ricevas gravajn rekonon de Vatikano, kies radiostacio regule elsendas Esperante. La ĝenerala direktoro de Radio Vatikana, pastro Pasquale Borgomeo, parolis en la kongresa inaŭguro — en prestiĝa salono de la urbodomo —, same kiel i.a. prof. Luciano Corradini, prezidanto de Katolika Unuiĝo de Mezlernejaj Instruistoj, iama vicministro pri publika instruado. Salut-telegramojn sendis kardinalo Angelo Sodano, Vatikana ŝtatssekretario, la esperantista ĉefepiskopo de Prago, kardinalo Miloslav Vlk k.a.

Dum la ĝenerala aŭdienco en Placo Sankta Petro la 3-an de septembro, Papo Johano Paŭlo la 2-a adresis sin al la kongresanoj jene, en Esperanto: “Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de IKUE, engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturas”.

La saman tagon la kongresanoj aŭdiencis ĉe la itala prezidento, Oscar Luigi Scalfaro. Li dankis la e-istojn,

kiuj agadas ne nur por disvastigi komunan lingvon, sed ankaŭ por idealoj de repaciĝo, konkordo kaj frateco.

Inter la kongresaj momentoj elstaris kiam la itala episkopo mons. Giovanni Locatelli kaj 16 diversnaciaj pastroj celebris Esperantlingvan meson ĉe ĉefaltaro de la Baziliko de Sankta Petro.

La kongreso plu laboris (4-7 sept.) en Rimini: al tagoj de medito kaj studo pri la kongrestemo (“Iru do kaj disĉiplinu ĉiujn naciojn”) aldoniĝis renkontiĝoj kun aŭtoritatuloj religiaj kaj civilaj. Elektiĝis lokoj por du venontaj kongresoj: Ekumena en Nantes (1998; vd. p. 194), Ekumena kaj Katolika apud Varsovio (1999). El la multaj kongresaj aspektoj substrekindas la promesdona ĉeesto de gejunuloj.

Laŭ raporto de Carlo Sarandrea, sekretario de IKUE



Anoj de la dua simpozio pri rilathistorio inter Japanio kaj Koreio

Unika perado historia

Esperanto funkcias perile en la laboroj de japanoj kaj koreoj pri la rilathistorio inter siaj landoj. 23 japanoj kaj 7 koreoj kundebatis jam en dua simpozio tiun temon (Kobe, Japanio, 29-31 aŭg.).

Ĉiuj partoprenantoj — plejparte nefakuloj — de la 12-hora simpozio, organizita de E-grupo por Komuna Lernolibro pri Historio, profunde emis pristudi la rilathistorion kaj klopodis diskuti sincere kaj interkomprene.

Kelkaj kontribuoj: NISIO Tutomu (Japanio) demandis ĉu ne necesas mencii en mezlernejaj lerniloj “konsolvirinojn” (perforte prostituitajn de la japana armeo) kaj atentigis ke NITOBE Inazo, konata internacia oficisto favora al E-o, suspektele opiniis ke aneksi Koreion necesas por defendi Japanion. HO Song (Koreio) avertis ke

milit-krimuloj kaj iliaj simpatiantoj plu ĝuas altajn sociajn poziciojn. TAHIRA Masako (Japanio) kaj CHOI Yun-huy (Koreio) raportis pri la historio kaj nuna vivo de eks-konsolulinoj; SASANUMA Kazuhiro informis ke japanaj lernolibroj unuafoje mencias ilin en 1997, sed sen klarigo. MIJAKE Eiji kaj KIMURA Goro parolis pri problemoj de la historio-edukado. TERAJIMA Toŝio (Japanio) analizis la respondecon de regnestro Hirohito en la Azia Pacifika Milito. KIM Yang Sun (Koreio) priskribis la suferojn de la koreoj sub la asimilisma reĝimo japana.

Por publika prelegkunveno estis invitita prof. MIZUNO Naoki, japana fakulo ne-esperantista, kiu en sia prelego kritikis la sinpravigajn agadojn pri la japana koloniado en Koreio, kaj la korea fakulo esperantista prof. SO Gilsu, kiu proponis novan ideologion “por starigi ĝustan rilaton inter Koreio kaj Japanio”. En la kunveno, kiun ĉeestis 25 personoj krom la simpoziantoj, salutis KUBOI Norio, la aŭtoro de *Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko*, tradukita Esperanten [vd. recenzon en jul.-aŭg. '96, p. 134].

Preskaŭ ĉiuj simpozianoj montris deziron plu partopreni ĉi tiajn eventojn. Trilingva prelegtekstaro baldaŭ haveblas ĉe la Libroservo de UEA.

Laŭ raporto de NISIO Tutomu, Takadono 4-13-3, Asahi-ku, Osaka-si, 535 Japanio;
 ☐nbg02407@niftyserve.or.jp

OSIEK donis helenan influon

La konferenco de OSIEK (12-18 jul., Rafina, Grekio) estis, kiel kutime, inter la intelektaj plej stimulaj E-eventoj de la jaro.

Antaŭ precize 50 jaroj alvenis en la postmilitan Greklandon per trupoŝipo juna soldato. Ne por dispafi postrestintajn malamikojn; fakte, li portis nenium armilon krom atestilo de Ruĝa Kruco, ĉar li estis en uniformo de la brita medicina korpuso.

Tiu soldato estis mi. Jam en la unuaj tagoj mi amikiĝis kun grek-devena brito. Kiel povintus mi tiam scii ke li estas ŝipposedanto, kiu poste min dungos kiel kontiston? Ankaŭ alian amikon mi akiris en Ateno, nome la delegiton de IEL/UEA. Li estis aŭtentika *pioniro de Esperanto*, d-ro Anakreon Stamatiadis, kiu eĉ renkontis doktoron Zamenhof. Fino de la prahistorio.

Ĝis lastatempe mi nenion sciis pri OSIEK, sed kiam somere de 1997 mi rimarkis anoncon pri ĝia konferenco en Rafina (je 30 km-oj oriente de Ateno) sub la titolo "Helenaj influoj en la mondkulturo", mi nuligis ĉiujn aliajn rendevuojn kaj tuj aliĝis.

Je mia granda plezuro, tiu semajno montriĝis sukcesega: vere profesia aranĝo, altnivelaj prelegoj, 47 aliĝintoj el 13 landoj, vesperaj festoj kun greka etoso... Kronis (por mi) la eventon ke la bonepo de d-ro Stamatiadis, s-ro Spiros Sarafian, estis fotokopiinta por mi el la albumo de tiu pioniro tutan paĝon, kiun en 1947 plenigis la juna soldato, en surprize bona Esperanto.

Sed kio estas OSIEK? Laŭ la plena nomo, Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj, eblus pensi ke ĝi celas profesiajn konferencistojn. Fakte, la OSIEK-apogantoj per modesta kotizo subtenas altnivelan seminarion ĉiujare kun serioza temo, kie regule premiĝas esperantisto "pro kultura kreaĵo".

Sep prelegoj temis pri mitologio, antikva ekonomio (Poly Zarkada resp. Mantha Christou, Grekio), helenaj kaj greka fonetiko (Günther Becker, Germanio), demokratio (Jan Göldrich, Slovakio), heleneco en la ĉiutago (Maria Butan, Rumanio), Ateno kaj Jerusalemo kiel fontoj kristanisma (Bruno Masala, Francio) kaj pri novplatonismo (Eugène de Zilah, Francio).

Honeste diri ke mi pli ĝuis la debatojn ol la prelegojn implicus kritikon de ĉi lastaj. Nu, ili estis bonkvalitaj, zorge preparitaj. Sed jen okazo por atentigi ke preparado de lekcio implikas ankaŭ iom da aktorado kaj emfazado de la gravaj vortoj kaj frazoj, nekutimaj terminoj kaj propraj nomoj.

Konferenc-fine ni elektis la premion de la jaro, Fernando de Diego pro lia traduko de la literatura juvelo *Cent jaroj da soleco* de Gabriel García Márquez. En 1998 OSIEK seminario, en Triesto, pri "Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo".

Johano Rapley (Britio/Francio)

Serve al SERVAS

Kreita de esperantistoj en 1949, la asocio SERVAS ricevis sian nomon el la Esperanta verbo servi.

Ĝi celas antaŭenigi internaciajn laboradon, studojn kaj vojaĝadon, kaj plej sukcesis ĝis nun en la lasta kampo.

Malgraŭ ĵusaj inundoj en la regiono, cento da SERVAS-anoj ariĝis por premiera Somera Universitato de SERVAS (10-16 julio) en Teplice nad Metují (Ĉeĥio). Ili interparolis pri temoj interesaj por vojaĝantoj kaj gastigantoj de SERVAS — sed plejparte anglalingve, kio baldaŭ igis multajn franc- kaj germanlingvanojn rezigni pri la kunvenoj. Fine naskiĝis rezolucio por estonte devigi du komunik-lingvojn reciproke tradukendajn.

Jen kie Esperanto povus ludi sian rolon. Por remalkovrigi ĝin al la anaro de SERVAS, François Randin proponis al trideko da aliĝintoj dekhoran enkondukon al Esperanto. Malkovrantaj ludigan lingvon, la gelnantoj ricevis instruadon surbaze i.a. de *Gerda malaperis* kaj vidbendoj fikciaj kaj dokumentaj de la firmao NANDIR. En la fino gratulis ilin, kun brakplenoj da donacoj, Vláda Hasala, komitatano de Ĉeĥa E-Asocio. Li ne forgesis memorigi ke UEA kaj SERVAS jam havas ion komunan: ili kunuzas la saman oficejon ĉe UN en Novjorko.

Francisko Randin (Svislando)

Oficiale en Esperanto

Prepare al la 50-jara jubileo (en 1998) de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Oficejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj kolektis tradukojn de ties teksto en pli ol 200 lingvoj. Laŭ ĝia peto, la CO de UEA provizis en septembro la koncernan TTT-paĝon (<http://www.unhchr.ch/html/MENU6/1/esperant.htm>) per la Esperanta teksto (Ralph Harry, 1963) de la Deklaracio.

La 34-a — ankaŭ kompaktdiska — eldono de Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj, (eld. K.G. Saur, P.O.B. 701620, DE-81316 München, Germanio; <http://www.saur.de>) estas baze anglalingva, sed ĝi registras ankaŭ organizaĵojn kies oficiala nomo estas en Esperanto.



Prof. Roman Herzog

Ankaŭ la 41-an Internacian Seminarion en Traben-Trarbach (vd. "Kalendario", p. 193) protektos altrangulo: Kurt Beck, ĉefministro de la federacia lando Rejnlando-Palatinato, kie situas Traben-Trarbach.

Altaj Protektantoj

La federacia prezidento de Germanio, prof. Roman Herzog, estos la Alta Protektanto de la Universala Kongreso en Berlino (1999). Laŭ sia akcepta letero, li opinias ke "Universala Esperanto-Asocio de longe metas sian laboron en la servon de la interkompreniĝo de popoloj" kaj ke "Universalaj Kongresoj estas kolono de kunlaboro ampleksanta la tutan mondon".

Herzog jam akceptis similan funkcion en 1996, por la 52-a Internacia Junulara Kongreso en Güntersberge.

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 15



**Kiel antaŭ-
vidite, la
proponoj de
Bernard Gol-
den altiris
multajn kri-
tikojn (p. 190).**

**Ĉi-foje estas malpli da ŝokaj
konsiloj, sed pli da proponoj
kaj raportoj. Kompreneble,
eĉ pli bona ol propono pri
manieroj sukcesigi nian
informadon estas sinpropono
por entrepeni la taskon
proponitan! Finfine, mi ŝatus
emfazi mian deziron ricevi
informojn pri agadoj kaj
aliajn prefere per retroŝto.**

Geoffrey Greatrex

Monda Ĵamboreo

Skolta Esperanto-Ligo jam konfir-
mis sian partoprenon en la 19-a
Monda Skolta Ĵamboreo (Ĉilio, 26
dec. 1998 – 6 jan. 1999), kiu kunigos
ĉirkaŭ 35 000 geskoltojn kaj 10 000
geskoltestrojn. Mi kore invitas ĉiujn
Esperanto-parolantajn geskoltojn
por membri en nia teamo. Ankaŭ
ne-skoltoj povas helpi:

- kiel membro de la Internacia
Serva Teamo;
- sendante al ni flugfoliojn naci-
lingvajn por represo kaj disdono;
- subtenante nin finance por la
starigo de budoj en la Ĵamboreo.

Héctor Campos Grez
Ĝenerala sekretario de SEL
Casilla 231, Curicó, Séptima Región,
Ĉilio; ✉ strigo@entelchile.net

Geskoltoj: Informoj kaj insignoj

Pro la strebado de Skolta Esperanto-Ligo (SEL), nun en la asocio Geskoltoj de Finnlando eblas akiri elekteblan fakinsignon per lernado de Esperanto. La insigno nomiĝas “La lingvisto”: ekzistas du niveloj, submajstra kaj majstra. La geskoltoj povas akiri ĝin lernante kiun ajn novan lingvon.

La kondiĉoj por ricevi la novan insignon estis unuafoje plenumebaj dum la pli ol 10 000-persona tendarego LOISTO en la somero de 1996. Tie entute 200 geskoltoj sekvis trihoran Esperanto-vojeton, gvidate de Carola Antskog, la reprezentantino de SEL en Finnlando, kaj de grupo da junaj skoltestroj speciale preparitaj por la okazo. La geskoltoj grupete iris de stacio al stacio por ĉiuloke lerni iom pli da Esperanto kaj iom post iom plenigi ricevitan kajeron. Fine ili intervjuis “eksterlandanon” (bedaŭrinde, esperantista skolto vere eksterlanda ne estis trovebla en la tendarego) kaj post ripetado de la scioj ricevis subskribon pri plenumo de la postuloj por la submajstra nivelo de “La lingvisto”. De iom da tempo la ŝtofaj insignoj estas jam haveblaj, kaj informoj pri “La lingvisto” aperis en la ĉefaj skoltaj gazetoj de Finnlando.

Dum LOISTO okazis ankaŭ aliaj Esperanto-program-eroj, kiel prelego, ekspozicieto, radia intervjuo, kaj ankaŭ la tendara gazeto donis atenton al Esperanto. Inter la gastoj de la tendara kafejo tre popularis la didaktika panelludo elektra kiu per bildoj instruas Esperanton kaj sonas ĉe ĝusta respondo. Tian profesinivelan panel-
ludon produktigos, en facile transportebla formo, la re-
prezentanto de SEL en Belgio: Arie Bouman, Dries-
dreef 8, BE-9030 Gent.

SEL pasintjare sendis leteron al pluraj skoltaj kaj skoltinaj asocioj en la angla kaj franca lingvoj (la oficialaj de la monda organizo de la skolta movado). Almetita estis enketilo, i.a. kun demando pri ekzisto de fakinsigno atingebla per Esperanto en la specifa asocio. La kampanjeto alportis manplenon da respondoj, ĉefe de personoj jam havintaj ian kontakton kun SEL. Resendintoj ricevis kiel signon de danko ekzempleron de *Ĵamborea lingvo*, la Esperanto-lernolibro de SEL.

Ankaŭ la kontaktoj de TEJO kun delegitoj de la skolta kaj skoltina mondaj organizoj portis fruktojn por SEL. Dum la pasintaj jaroj trifoje aperis artikoloj lige al SEL en *Eurofocus*, la gazeto de la Eŭropa Geskolta Oficejo en la lingvoj angla kaj franca, kiun ricevas la landaj skoltaj kaj skoltinaj organizoj kaj ties respondeculoj pri internaciaj aferoj. La unua artikolo estis transprenita el *Dialog'*, la plurlingva informilo de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO. La duan verkis Emmanuel Djikoune (Senegalio), lige al la SEL-agado dum la Monda Ĵamboreo en 1995 [vd. *Esperanto*, okt. '95, p. 169]. Ĉi-jare en la junia *Eurofocus* aperis artikolo de Jarosław Fotyga pri la pasintjara TEJO/SEL-seminario [vd. jan. '97, p. 7].



Anna Ritamäki
Redaktoro de La Skolta Mondo, organo de SEL
Dragsfjärdsvägen 690, FI-25700 Kimito, Finnlando;
✉ aritamak@ra.abo.fi

Redaktoro: Geoffrey Greatrex, The Highlands, Great Doward, Symonds Yat, Herefordshire, Britio
HR9 6DY; ✉ greatrexgb@cardiff.ac.uk **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015
BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; 📠 +31 10 436 1751; ✉ uea@inter.nl.net

Eŭro-parlamentanoj ricevas E-revuon

Ekde la numero 1996/6, *L'Esperanto*, la organo de Itala Esperanto-Federacio, estas sendata al ĉiuj italaj anoj de Eŭropa Parlamento. Ĝi ofte enhavas la itallingvan rubrikon "Eŭropo kaj la lingvo" pri la lingva problemo en Eŭropo kaj la iniciatoj pri Esperanto ĉe la instancoj de Eŭropa Unio.

amaskomunikiloj

Tutmonde: Televido

Kadre de la programo "Interne de Eŭropo" de la tutmonda novaĵ-televido CNN ĉ. 5-minuta ero temis pri Esperanto — koincide, vespere de la Ago-Tago (4 okt.), kun ripeto la postan tagon. Oni parolis — i.a. kun John Wells — pri E-o kaj la angla kiel eblaj duaj lingvoj de EU. Videblis TTT-paĝo de Virtuala E Biblioteko kaj E-libroj, estis legitaj versoj el *Winnie-la-Pu* kaj *Hamleto*. (Roland Rot-saert kaj Attila Kovács, Interredaktore)

Hungario: Gazeto

Artikolo (22 jul.) de László Gados, kies kontribuoj ofte aperas en la plej legata hungara ĵurnalo, *Népszabadság*, kontestis la realismon de la strebo ke ĉiu EU-civitano parolu tri lingvojn de la Unio.

Jugoslavio: Gazetaro

En ĉiu dimanĉa numero, de aprilo ĝis aŭgusto, sekveblis en la taggazeto *Politika Ekspres* E-kurso por komencantoj, preparita de Jovan Janković. En la opozicia taggazeto *Demokratija* aperis (15 apr.) mallonga intervjuo kun Renato Petrović, prezidanto de loka E-societo. La bulteno de la ligo de judaj komunumoj enhavis en aprilo dupaĝan artikolon de Agnesa Eremija pri Zamenhof kaj Esperanto. (Renato Petrović)

Pollando: Televido

La regiona televido en Katowice invitis la prezidanton de la E-klubo en Gliwice, Stanisław Mandrak, paroli kvaronhoron pri Esperanto en matena programo la 18-an de julio. Menciigis ankaŭ la helpo kiun donis e-istoj al siaj gekolegoj en suda Pollando, norda Ĉeĥio kaj Moravio dum la katastrofaj inundoj.

Brazilo: Radio, gazeto

Ekde aŭgusto, la Universitata Radio de Fortaleza elsendas, la duan kaj kvaran dimanĉon de ĉiu monato, programon en kaj pri Esperanto. (Adelson A. Alves Sobrinho)

A *Voz do Oeste*, gazeto el la urbo Lins (San-Paŭlo) havas Esperanto-rubrikon.

Francio: Radio

Radio France Internationale dediĉis 20-minutan elsendon (27 jun.) en sia "Magazino pri migradoj" al Esperanto. En simpatia etoso babilis la konata lingvistino Henriette Walter kaj la esperantistoj Krešimir Barković (ĝenerala sekretario de SAT) kaj François Lo Jacomo (akademiano). (F. Lo Jacomo)

Redakcia mispaŝo surpaĝe

Verŝajne neniam iu artikolo de *Influo* provokis tiom da reagoj kiom ni ricevis post la apero de "Propagandaj mispaŝoj surstrate" de Bernard Golden (*Influo* 14, p. 131). La reagantoj samopinias: Golden provoke ofendis homojn kiuj sindediĉe — kaj tre ofte efike — inform-laboras por Esperanto. La redaktoro kaj la Informa Fako sincere pardonpetas de ĉiuj ofenditoj pro sia publikiga mispaŝo.

Membrigu nur Adonisojn kaj Afroditajn

Ĉu B. Golden, kies kutiman takton mi retrovas en "Propagandaj mispaŝoj... ", iam aŭdis pri la "amputita depeŝo de Ems", kies enhavo, tranĉita de la tuto, iĝis tiel insulta por Francio ke ĝi ekigis la militon 1870-71 inter Francio kaj Germanio?

La bildoj kaj la teksto de lia artikolo efikas sammaniere. Li estu kontenta! Mi bone komprenis ke estonte en Esperantio estos loko nur por ege allogaj gejunuloj. Li serĉu kaj trovu ilin. Mi kaŝos min en hejmo por maljunuloj kaj neniam plu aŭdacos paroli pri kaj en Esperanto.

Mi konsilas al UEA peti bildon antaŭ ol akcepti novan individuan membron. Forigu senkompate tiujn kiuj ne plu estas Adonisoj aŭ Afroditaj. Kaj bonvolu peti s-ron Golden ke li sendu al mi bildon per kiu mi povos juĝi ĉu li ne estas korpulenta kalvulo kaj ĉu lia edzino ne estas mezaĝa matrono; mi ankaŭ ŝatus kontroli liajn vestaĵojn, ĉu li glate razas sin kaj ĉu li ĝuis ĝentlemanan edukadon.

Mi ne komprenas ke vi akceptis presi bildojn senditajn de viaj grupoj por ke homo kiu ĉiam gale skribas moku ilin.

Hélène Falk-Bracke

(unu el la Bruselaj klaŭnoj, vicprezidentino de E-ista Brusela Grupo)

Mortigi la entuziasmon

Mi malŝatis la manieron kiel B. Golden rekte mokis kaj insultis homojn kiuj aktivis. Mi ankaŭ miras kiel la fotoj, kiuj estis senditaj al la revuo kiel oficialaj fotoj de diversaj Ago-Tagaj aranĝoj, povis aperi en la artikolo de Golden. Ĉu ne Ago-Tago estas pli-malpli oficiala monda aranĝo, kiun subtenas eĉ la prezidanto de UEA? Ĉu ne tiatipaj artikoloj povas mortigi la entuziasmon fari ion?

Tiina Oittinen (Finnlando)

Grizharuloj kaj minijupulinoj kune


Jes, nepre ni evitu klaŭnadon kaj ni provu zorgi ke ĉe niaj informstandoj troviĝu ne nur grizharuloj aŭ aspekte forpelaj homoj. Estas klare ke por varbi junulojn ni bezonas junulojn. Sed estas plej bone montri ke Esperanto taŭgas por ĉiu aĝo, kaj do eventuale plej bonus se grizharuloj kaj minijupulinoj propagandus kune.

Plej malbonaj propagandistoj estas tiuj kiuj posedas nenion krom fervoro, provas varbi homojn per troigoj kaj ne kapablas respondi seriozajn demandojn pri Esperanto. Tia persono malutilas kaj do prefere ne sidu ĉe informstando.

Sabine Darbellay, brunhara (Germanio)

Francio: Gazeto

Regiona paĝo de la nord-franca ĵurnalo *La Voix du Nord* artikolis (7 aŭg.) pri la vizito de la vjetnama esperantisto DẶNG DÍNH DẶNG ĉe siaj amikoj, ges-roj Duchâteau, en Nieppe. Kelkdekoj da legantoj petis informojn pri Esperanto-ler-nado per la indikita telefon-numero de Nordfranca E-Federacio. La televido FR3 elsendis intervjuon (1 sept.) kun DẶNG (surbilde klarigas pri la vjetnama lingvo) kaj klubanoj en Lille.





Senpaga reklamilo en Francio

Francaj e-istoj povas preskaŭ senpage (kontraŭ sendokostoj) ekhavi ruĝan paneleton por reklami E-on (s-ino Odette Scheidel, 35 Grand-rue, FR-67660 Betschdorf, Francio; ☎ 03/88-54-45-02). La elektronika reklam-servo kiun ĝi indikas direktas al la landa asocio UFE. Por tia reklamilo ne necesas pagi imposton. Eblas fiksi ĝin ĉe sia domo, sur ĝardenbarilo, garaĝmuro ktp.

Edmond Ludwig (Francio)

Senkaŭzaj ofendadoj

Kial, kial? Kial B. Golden kulpigas kaj kalumnias e-istojn kaj iliajn agojn? Kial *Esperanto* konsentas publikigi liajn insultojn? En nia lando kalumnio estas punata krimo. Ni, la "finninoj", devas kompletigi la informojn (jan., p. 4) pri nia Ago-Taga aranĝo, por ke leganto de la julia n-ro ne taksu ĝusta la moka skribaĉon de Golden: Pro la pluvema sezono ni staris ne "ĉe strat-stando", sed interne en urbocentra komerca kvartalo. Tie dum la Ago-Tago privilegie prezentiĝis modvendejo. Ni neniel rajtis aktori, sed *ni pagis* por informraĵo. Feliĉe, la publiko ne "spertis tedan ekspozicion de malnovaj virinaj modoj" (fantaziaĵo de Golden), sed ĝuste la vestoj, aludaj al teatraĵoj, allogis publikon kaj vekis diskutojn. Male al sektanoj (iliajn kutimojn Golden proponas), kies manieroj en Finnlando estas tre malplaĉaj, ni ne haltigis preterirantojn nek trudis al ili niajn materialojn. Kontraŭe, ili venis al ni demandi pri Esperanto, kaj ni povis rekte interparoli. Ĉi tiel ni sukcesis doni informojn: ke ekzistas E-lingvaj teatraĵoj jam 100 jarojn kaj aliajn, laŭ la demandoj.

Ni "malbelaspektantaj matronoj" pretas ĝoje doni la taskojn al "pimpaj junulinoj", kiam ni ilin trovas. Ĉu nur ili kapablas doni impreson de kredoblo kaj respektindeco pri E-o? Bonan stilon ankaŭ ni rigardas grava: tiun de Golden ni do volas eviti, ĉar ĝi detruas E-on, forpelante membrojn al kiuj plaĉas la originala interna ideo.

Ne ne volus legi eĉ senpage senkaŭzajn ofendadojn en la revuo *Esperanto*.

Anja, Leila, Toini kaj Anna-Liisa (Finnlando)

Ankaŭ ĝentileco estas "stilo"

Se temas pri ŝerco, la komento de B. Golden pri foto de du surstrataj aktivuloj estas aparte neamuza. En la mala kazo temas pri neallasebla persona atako kontraŭ du viroj, cetere tre simpati-aspektaj. Demando pri stilo, vi diris. Pri stilo kaj ĝentileco vi havas ankoraŭ multon por lerni, sinjoro. Evidente.

Marc Bavant (Francio)

Alispeca valor-vido

Golden opinias ke Miko Sloper kaj Ionel Oneț estas malbelaspektaj. Se laŭ Golden kompletoj, kravatoj kaj blankaj ĉemizoj estus pli allogaj en la centro de la vilaĝo Berkeley, li profunde eraras. Kaj loĝante mem kaverne en Hungario, kiel li povus scii kio estas alloga en Berkeley?

Se temas pri la du personoj — "sindediĉaj uloj", laŭ Golden, refoje sarkasma insulto al du vere sindediĉaj kaj kapablaj usonaj esperantistoj —, en niaj okuloj ili estas ja belaj.

Malplaĉas al Golden ŝajne la manko de "pimpaj junulinoj kun minijupoj" inter lokaj esperantistoj, kiujn ni povus ekspluati enbude. Al Golden mi diru: Eĉ se ni havus tiajn "allogilojn", kiel vi seksisme ilin nomas, ni prezentus ilin al la publiko nur se ili estus kleraj pri Esperanto kaj ties avantaĝoj.

Fine, Golden sugestas ke ni neniel uzu "korpulentajn kalvulojn kaj mezaĝajn matronojn". Klare, en nia mondparto ni havas alispecan vidon pri la valoro de esperantistoj de ĉiaj aĝoj, grandecoj, aspektoj kaj kredoj.

William R. Harmon, Ĉefdelegito de UEA, Usono

⬢ Kebekio: Gazeto

Petinte de E-Societo Kebekia abundajn informojn pri Esperanto, la ĵurnalisto Normand Cazalais publikigis dupartan (15, 22 aŭg.) artikolon senpartian en la ĵurnalo *Le Devoir*, specife pri Esperanto-turismo. Lia konkludo: "Mi ne parolas Esperanton. Eĉ ne unu vorton. Sed ne estas ekskludite ke iam mi lernos ĝin, almenaŭ por testi ĝian utilecon kiel vojaĝ-lingvo." Laŭ Sylvain Auclair la iniciaton de Cazalais povis instigi letero kiun li sendis al Cazalais du jarojn pli frue, reage al ties malagrabla vortumo pri Esperanto en samgazeta artikolo. (*La Riverego*)

Aŭstrio: Radio, gazeto

En preskaŭ duonhora programo (5 aŭg.) de Aŭstria Radio 1 oni intervjuis en la Internacia E-Muzeo (IEM) la e-istan familion Klag, muzean prizorgantinon Helga Faruk-oye kaj universitatan lektorinon Michaela Bürger. Temis ankaŭ pri la "listo Pirlot" de eŭro-parlamentanoj kiuj pretas konsideri Esperanton en la solvado de la eŭropa lingvoproblemo. (*Aŭstria E-Revuo*, L. Patek)

La "listo Pirlot" estis menciita ankaŭ en la tutpaĝa artikolo (26 sep.) "La mondampleksa idiomato" de Christine Herner en la ĵurnalo *Wiener Zeitung*. Ŝi raportis multflanke, en preskaŭ entuziasma tono, pri la realaĵoj de Esperantujo, donante la parolon i.a. al Michaela Bürger, farinta esplorojn en IEM por prelego "Esperanto: ĉu pozitiva aŭ negativa utopio en laabela Eŭropo?", kun konkludo pozitiva por Esperanto. (L. Patek)

Slovakio: Gazeto

En la urba gazeto de Poprad aperis (22 aŭg.) frontpaĝa intervjuo ("Tutmonde ili estas amikoj") kun partoprenintoj de la ĵusa Somera E-Lernejo. (*Esperantisto Slovaka*)

🏠 publika agado

Usono

La 21-an de sep., dimanĉe, anoj de la Novjorka E-Societo deĵoris ĉe tablo en granda strاتفiro de libroj. (*Novjorka Prismo*)

Argentino

Kordoba E-Asocio partoprenis tradician librofeston en Córdoba en la unua semajno de septembro. (*Antaŭen — ¡Hacia adelante!*)

Brazilo

José Rabello de Paula dissendis en 1996, helpe de Kultura Kooperativo de E-istoj en Rio-de-Janeiro, 397 informajn korespondantojn al amaskomunikiloj, kulturcentroj ks. Li persone transdonis al dekkvino da publikaj bibliotekoj la portugala-lingvan libron *Não só idealistas mas realizadores* (konataj brazilaj e-istoj atestas pri sia vivovojo). (*INKO*)

Estonio

Helgi Hromova kaj Jaan Ojalo preparis ekspozicion (20 majo-18 jun.) en la Centra Biblioteko de Tallinn pri Zamenhof kaj pri la Esperanta literaturo. (*Informoj de EAE*)

La tago kiam informado nepras

La 4-an de oktobro, sabate, denove aktivis la inform-agade vigla parto de Esperantujo. Jen revuo de la raportoj ĝis nun ricevitaj. (Se ne estas indikita alia dato, ĉiam temas pri la 4-a de oktobro.)

Belgio

La 30-an de sept. la loka televido Focus (ricevebla de 500 mil homoj en nord-okcidenta Flandrio) dediĉis duminutan programon al la Markola Kongreso (26-28 sep.) de la klubo en Oostende. (Interredaktore)

Brazilo

En la ĉefurbo Braziljo okazis solena sesio en la ĉefa aŭditorio de lingva centro kie Esperanto estas instruata. Aŭtoritatuloj salutis la esperantistaron, kaj la grupo Nova Erao prezentis E-kanzonojn. (Interredaktore)

En Taguatinga (Federacia Distrikto) la loka klubo ekspoziciis (2-4 okt.) en urbocentra biblioteko. (Roberto Resende)

Rezulte de la intereso vekita pro la elekto de Salvadoro, la ĉefurbo de la ŝtato Bahio, kiel la okazejo de la venontjara Brazila Kongreso de Esperanto, oni inaŭguris Esperanto-kurson ĉe la Ŝtata Universitato de Feira de Santana. (Interredaktore)

Francio

Per ekspozicio de Orientfranca E-Federacio kaj materialo de Tutmonda Asocio de Konstruistoj E-istaj, Michel Basso kaj Edmond Ludwig prezentis E-on dum la tago de la asocioj en Wintzenheim. (E. Ludwig)

Hungario

Dank' al financa subteno de Hungara E-Junularo (HEJ), la teamo de *Eventoj* pretigis, presis kaj dissendis koloran A3-afiŝon pri la avantaĝoj de Esperanto. Ĝi estis ekspedita al ĉiuj 800 mezlernejoj de la lando (kun akompana letero al la direktoroj) kaj al ĉiuj

(ĉ. 700) HEJ-membroj kun la peto afiŝi ĝin en mezlernejoj kaj universitatoj. Rezulto: telefonvokoj de lernantoj kaj instruistoj petantaj informojn pri la lingvo kaj pri eventualaj kurso-startigoj. (László Szilvási)

Vendata en 80 mil ekzempleroj, la taggazeto *Vas Népe* kontribuis al la Ago-Tago per tutpaĝa artikolo bazita sur intervjuo kun Katalin Smidélus. Sekve de ĝi pluraj telefonis, kelkaj komencis lerni Esperanton. La semajnfino post la Ago-Tago, en tutlanda komerca ekspozicio en Szombathely, estis disdonataj varbaj flugfolioj kaj vendiĝis E-libroj kaj vortaroj. (Katalin Smidélus)

Irano

Estis lanĉitaj novaj E-kursoj en Teherano. Instituto Sábz Āndišān mendis anoncojn en diversaj naciaj gazetoj pri la sukcese aranĝata koresponda E-kurso. (Interredaktore)

Italio

La ĉefa librovendejo de Triesto disponigis dum semajno (30 sep.-6 okt.) montrofenestron por verkoj pri kaj en Esperanto. Ĝi ankaŭ donis lokon, la 3-an de okt., al gazetara konferenco, kiu prezentis la agadon de Triesta E-Asocio en 1997-98: partoprenis ĵurnalistoj de la urbaj taggazetoj, kaj oficiala komunikilo estis sendita ankaŭ al aliaj amaskomunikiloj. Samloke, posttagme ĉ. 40 personoj aŭdis publikan prezenton pli detalan. La postan tagon okazis rendevuo, por interkonsentoj pri subteno, kun la skabeno pri kulturo de Lignano Sabbiadoro, la urbo kie okazos Internacia Junulara Festivalo [vd. "Kalendaro", p. 193]. (Edvige Tantin Ackermann)

Kroatio

En Zagrebo Studenta Esperanto-Klubo organizis malferman tagon prelude al siaj novaj kursoj, kiujn gvidos, de la 14-a de okt., Mila Bečka. La televido OTV, kvin radiostacioj kaj tri gazetoj informis pri la aranĝo.

La verkisto István Nemere kunfestis, la 28-an de sep., la 90-jaran jubileon de la plej aĝa E-klubo en Kroatio, E-Societo de Rijeka — la urbo gastigonta la sekvan IJK. Ĉi-okaze en la revuo *Novi list* aperis granda intervjuo fare de e-istino Snježana Bokulić kun Rado Škalamera, historiisto de la loka movado.

En la Universitata Biblioteko de Pula d-ro Ivo Borovečki, Honora Membro de UEA, malfermis la 7-an de okt. ekspozicion de Esperantaj infanlibroj el 17 landoj, okaze de la Internacia Infana Semajno. Raportis du televido, Radio Pula kaj la gazeto *Glas Istre*.

Instigitaj de Višnja Branković el Triesto, italaj esperantistoj semajnfinitis turisme en la bieno de Spomenka Štimec kaj renkontis esperantistojn de Varaždin kaj Čakovec. (Spomenka Štimec)

Kiel en la antaŭaj jaroj, Kroata E-ista Unuiĝo aranĝis informbudon, vendrede la 3-an, en la ĉefa Zagreba magazeno NAMA. Ĉi-jare pli da spaco ebligis prezenti pli da Esperantaĵoj: dekon da lernolibroj por diversaj aĝgrupoj, aliajn lernilojn kaj helpilojn, la video-kurson *Mazi en Gondolando*, religiajn eldonaĵojn, kaj plurajn diskojn, kies ekzisto aparte mirigis la vizitantojn. Afiŝoj prezentis la agadon de KEU kaj Esperanton ĝenerale. La Ago-Tago estis anoncita tagon pli frue en radio-intervjuo de KEU-sekretario Marija Beloŝević. Dum la tago mem aperis anonco en unu el la plej grandaj taggazetoj, kies ĵurnalistoj ankaŭ vizitis la budon. (Marija Beloŝević, Interredaktore)

Rusio

Rezulte de informkampanjo de Moskvaj esperantistoj, la 434 deputitoj de la rusia landa parlamento kaj la 35 anoj de la Moskva urba konsilio ricevis la 3-an de okt. leteron, kiu atentigis pri la internacia lingva problemoj, pri "la ebleco protekti la naciajn lingvon kaj kulturon de fremdaj influoj" proponata de e-istoj, kaj koncize informis pri Esperanto.

Malferman kunvenon de la Moskva junulara klubo MASI la 2-an de okt. ĉeestis ĵurnalistoj. Sekve, samvespere ĉe la Rusa Servo de BBC kaj la postan matenon ĉe "Radio de Rusio" (la ĉefa ŝtata radio-kompanio) sonis intervjuoj pri Esperanto kaj Esperantaj kantoj; en la anglalingva ĵurnalo *Moscow Times* aperis intervjuo, kaj estis atingita interkonsento pri artikolo en *Literaturnaja Gazeta*. (Nikolao Gudskov, Interredaktore)

En la ĉefurbo de Dagestano, Mahaĉkala, la prezidanto de Rusia E-ista Unio, Abdurahman Junusov, kaj membroj de la loka E-klubo organizis gazetaran konferencon la 6-an de okt. Partoprenis du ĉefaj respublikaj televid-kompanioj, la radio kaj ĉiuj gazetoj de Dagestano. Estis prezentita ankaŭ ekspozicio de E-literaturo kaj E-gazetoj. La saman aŭ la postan tagon ĉiuj reprezentitaj amaskomunikiloj publikigis materialojn pri la Ago-Tago kaj/aŭ Esperanto. (Abdurahman Junusov; Nikolao Gudskov, Interredaktore)



Finnlando

Dum la kvina Ago-Tago en Turku, la loka E-societo kaj E-Asocio de Finnlando kune agis en la ĉiujare okazanta librofoiro (3-5 okt.). Ĉe propra stando estis venditaj E-libroj novaj kaj uzitaj, kaj Esperantaj kompakt-diskoj. Eĉ elĉerpiĝis la surloka stoko de la finna klasikaĵo *Sep fratoj*. La pli ol 10 mil vizitintoj probable ĉiuj vidis la standon; ĉ. 200 parolis kun la deĵorantoj. Sur la foto: Jukka Pietiläinen (prezidanto de EAF) kaj Tiina Oittinen. (Tiina Oittinen)

Kalendaro 1997-98

Jen daŭrigo kaj kompletigo de nia aranĝo-listo aperinta en julio (p. 126). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro", la plej kompleta, aperos en marto.

plurfoje

Barlaston: d-ro Derek Tatton, Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ✉372-393
Esperantotur: str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; ☎+48/52/415-744; ✉460-082; ✉turismo@bydg.pdi.net
Interreto: Daŭre aktualigata listo de E-aranĝoj estas konsultebla ĉe <http://www.hungary.net/esperanto/>. Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al ✉w3mail@gmd.de: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Eventoj*.

novembro

- 23-24: 14-a Kulturkunveno, Kameoka, Japanio (EPA, Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-hu, 621 Japanio, ☎+81/771/225-561; ✉250-061; ✉100507.1652@compuserve.com)
 29: Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo (CO de UEA, adreso en la kolofono; vd. p. 186)

decembro

- 05-08: 6-a Diseminario de Itala E-ista Junularo, Treviso, Italio (Flavia Dal Zilio, via Cappellotto 11, IT-31100 Treviso; ☎+39/422/23-760; ✉f.dalzilio@rv.flashnet.it; temo: "Rilato inter Oriento kaj Okcidento de Eŭropo")
 13: 3-a Kostarika Kongreso de Esperanto, San José, Kostariko (Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José; ☎+506/222-49-72; ✉miaumiau@sol.racs.co.cr)
 16-18: 1-a Turisma Duonsemajno de Irana E-ista Junularo Organizo, Mashad, Irano (P.O.K. 17765-184, Tehran; ☎+98/21/623-31-09; ✉623-69-13; ✉irejo@neda.net)
 26-31: 5-a Togolanda E-Kongreso, Atakpame, Togolando (Unuigo Togolanda por E-o, B.P. 12096, Lomé)
 27-03 jan.: 41-a Internacia Seminario, Traben-Trarbach, Germanio (Germana E-Junularo, Chausseest. 8, DE-10115 Berlin, ☎/✉+49/30/283-43-20; ✉neffets@cs.tu-berlin.de; <http://www.esperanto.de/treffen/is/1997/aligxilo.html>; temo: "Socio kaj komunikado")
 27-03 jan.: 14-a Internacia Festivalo, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nidenstein; ☎+49/5624/8007; ✉5624/322; <http://www.quicknet.se/ftp/dialup/q-111060/intfest.htm>; temo: "Eŭropo post 1989, Eŭropo antaŭ 1999")

- 29-02 jan.: Budapeŝta Silvestro, Budapeŝto, Hungario (Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, HU-1368 Budapest; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-03-31; ✉esperantohea@mail.c3.hu; <http://www.c3.hu/~esperantohea>)
 30-02 jan.: Silvestra balo, vintraj ekskursoj, Poprad, Slovakio (Esperanto – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio; ☎/✉+421/92/32-419)



83-a Universala Kongreso de Esperanto, 1-8 aŭgusto 1998, Francio

- 30-02 jan.: Transjara kurskunveno, Kameoka, Japanio (EPA, Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-hu, 621 Japanio, ☎+81/771/225-561; ✉250-061; ✉100507.1652@compuserve.com)
 30-03 jan.: Silvestra balo, kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj, Parizo, Francio (Raymond Pélard, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; ☎+33/1/42-78-68-86; ✉42-78-08-47)

1998

januaro

- 11-23: 14-a Aŭstralia Esperanta Somerlernejo, Ipswich apud Brisbano, Aŭstralio (Jay Grant, 32 Abbey St., Forestdale Qld. 4118; ☎/✉(Kay Andersen) +61/7/38-48-44-28; ✉jgrant@gil.com.au; kvin niveloj)
 24-25: La suvereneco de la ŝtatoj, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Kultura Centro E-ista, BP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/32/926-74-07; prelegas Sonja Koleva)
 24-08 feb.: Internacia Studejo pri E-Turismo kaj -Kulturo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

- 30-01 feb.: Ni festivalu!, teatra semajnfino, Barlaston, Britio (adreso supre; gvidas Paul Gubbins)

februaro

- 07-14: 39-a Internacia Fervojista E-ista Skisemajno, Maribor, Slovenio (Fervojista E-Societo, pf. 825, SI-2001 Maribor; ☎+386/62/417-822; ✉62/25-522)
 21-22: E-staĝo, Nantes, Francio (Marie-France Menanteau, av. du Commando, FR-44600 Saint-Nazaire; ☎+33/2/40-22-00-98)
 22-28: Semajno de Internacia Amikeco, tutmonde (Edvige Tantin Ackermann, Via Valerio 110a, IT-34128 Trieste, Italio; ☎/✉+39/40/350-093; ✉nored@iol.it)
 26-07 marto: 2-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Nepalo (Nepala Esperanto-Asocio, p/a Sierra Travel, G.P.O. Box 3565 Kathmandu; ☎+977/1/222-985; ✉228-194)
 27-01 marto: 10-a EoLA, "Esperanto – lingvo arta", festivalo dediĉita al la memoro de Jelena Lebedeva, Ivanovo apud Moskvo, Rusio (a/k 34, RU-117071 Moskvo; ✉ananjin@usa.net)

marto

- 22-29: Unua Rusa Sanmarineca sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, Moskvo, Rusio (Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio; ☎+49/551/376-072; ✉psusru@wiwi.hu-berlin.de; <http://obelix.forst.uni-muenchen.de/others/AIS/arangxoj/psusru.html>)

aprilo

- 06-13: 14-a Printempa Semajno Internacia kaj 4-a Printempa Lernejo Internacia, Bonn, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666; ✉psi@esperanto.de; <http://www.esperanto.de/psi>)
 08-14: 10-a Alp-Adria E-Konferenco, Lignano Sabbiadoro, Italio (Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; ☎/✉+39/40/763-128; ✉nored@iol.it; temo: E-instruado, gvidas Katalin Smidélus)
 08-14: 22-a Internacia Junulara Festivalo, Lignano Sabbiadoro, Italio (Friedrich Schreiber, via dei Cordaroli 7, IT-34135 Trieste; ☎+39/40/422-607; ✉763128; ✉fulmo@ts.flashnet.it; <http://www.newlog.it/esperanto/ijf98>; temo: "Bunta Eŭropo")
 10-13: 82-a Brita Kongreso de Esperanto, Chester, Anglio (Brian Burnett, Nantyr-Hafod Cottage, Llandegla, Clwyd, LL11 3BG Britio; ☎+44/1978/790-442; ✉106152.2120@compuserve.com; temo: "Esperanto por edukado")
 16-19: Junulara Esperanto-Renkontiĝo, Győr, Hungario (Hungara Esperanto-Junularo, pk. 87, HU-1675 Budapest; ☎/✉+36/1/282-88-85; ✉hej@math.bme.hu)
 17-19: 93-a Skota E-Kongreso, Dumfries, Britio (Sheila Burnett, 26 Langholm Street, Newcastleton, Roxburghshire TD9 0QX)

- 22-26: Scienc-teknika konferenco kun sekcio "Esperanto en Scienco kaj Tekniko", Vladivostoko, Rusio (Aleksandr B. Titajev, Do vostrebovanija, RU-690090 Vladivostok; espero@pub.marine.su)
- 25: Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo (CO de UEA, adreso en la kolofono)
- 25-02 majo: Seminario de TEJO/KER, Vitoria/Gasteiz, Eŭskio, Hispanio (TEJO, ĉe la CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Homaj rajtoj sub premo")
- 25-03 majo: Internacia Studejo pri E-Turismo kaj -Kulturo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

majo

- 16-22: 50-a Kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, Aalborg, Danio (50-a IFK, Banegårdspladsen 14, DK-9700 Brønderslev; [+45/98-80-15-99](tel:+4598801599))
- 29-01 junio: 6-a Internacia Kultura Semajnfino pri eldonado, Antverpeno, Belgio (Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; [+32/3/234-34-00](tel:+3232343400); [+32/3/234-34-33](tel:+3232343433); esperanto@agoranet.be; <http://esperanto.agoranet.be/fel>)
- 29-01 junio: 75-a Germana Esperanto-Kongreso, Dresdno, Germanio (Christian Darbellay, Johannesstr. 54, DE-24143 Kiel, [+49/431/735-016](tel:+49431735016); [+49/431/737-788](tel:+49431737788))

juno

- 09-18: 20-a Ĉebalta E-ista Printempo, Mielno, Pollando (Pola E-Asocio, pk. 30, PL-75-016 Koszalin-1; [+48/94/404-563](tel:+4894404563))

julio

- 18-24: Internacia E-Konferenco, Triesto, Italio (OSIEK, p/a Éric Laubacher, 1, rue des Vosges, FR-78100 Montigny-le-Bretonneux, Francio; eriel@iname.com; temo: "Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mond-kulturo")
- 18-25: 71-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Odeso, Ukrainio (Grigorij Geht, str. Bebelja 9/38, UA-270014 Odeso, Ukrainio; [+38/0482/217-336](tel:+380482217336); sat-esp@worldnet.net; <http://www.worldnet.net/~sat-esp/>)
- 18-25: 20-a Renkontiĝo de E-Familioj, Mosonmagyaróvár, Hungario (ges-roj Slezák, Damjanich u. 2, HU-9200 Mosonmagyaróvár; [+36/96/211-271](tel:+3696211271))
- 19-25: 12-a Internacia Junulara Semajno, Kecskemét, Hungario (Hungara E-Junularo, pk. 87, HU-1675 Budapest; [+36/1/282-88-85](tel:+3612828885); hej@math.bme.hu)
- 20-31: Internacia Metodika Seminario por E-instruantoj, Baugé, Francio (Grésillon, FR-49150 Baugé; [+33/2/41-89-10-34](tel:+33241891034); po semajnon gvidas Duncan Charters kaj Katalin Smidélusz)

- 21-25: 5-a MIRO (Mara Internacia Renkontiĝo), Savudrija, Kroatio (Kroatia E-Junulara Asocio, Amruševa 5/I, HR-10000 Zagreb; [+385/1/481-01-52](tel:+38514810152); esperanto@zg.tel.hr)
- 25-01 aŭg.: 54-a Internacia Junulara Renkontiĝo, Rijeka, Kroatio (kiel ĉi-supre)
- 25-01 aŭg.: 13-a Ekumena kongreso, Nantes, Francio (Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis; diaregno@altern.com)

aŭgusto

- 01-08 aŭg.: 83-a Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Infana Kongreseto, Montpeliero, Francio (CO de UEA, adreso en la kolofono, vd. krome p. 185; temo: "Mediterraneo — ponto inter kulturoj")
- 08-14: 32-a Konferenco de ILEI kaj ILEI-Gimnazio por 12-16-jaruloj, Montpeliero, Francio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby, Svedio; temo: "Lingvoinstruado, ponto al la mondo")
- 10-16: 6-a Kultura E-Festivalo, Lesjöfors, Svedio (Janko Luin, Myggdalsvägen 123, SE-13542 Tyresö; janko@esperanto.se)
- 15-21: 38-a Internacia Somerlernejo, trinivela kursaro kaj ILEI/UEA-ekzameno je elementa nivelo, Barlaston, Britio (adreso supre; instruos/prelegos M. Boulton, T. Carr, R. Edwards, P. Gubbins, K. Hall kaj A. Melnikov)

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1998

La Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn por sep branĉoj. La rezultojn oni anoncos kadre de la Universala Kongreso en Montpeliero. (Tamen, la konkursado neniel estas ligita al partopreno en la UK!) La laŭreatojn atendas monpremioj, pli altaj ol antaŭe. Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 83-a Universala Kongreso: "Mediterraneo — ponto inter kulturoj". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1997. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1998. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1998. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj la adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 410 gld. Dua premio: 287 gld. Tria premio: 164 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 287 gld. Infanlibro de la Jaro: 861 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ retpoŝte ĉe uea@inter.nl.net.

Laste aperis



Agrikulturo de la tropika zono, La / Agricultura de la Zona Tórrida, La (1826). Andrés Bello (1781-1865). El la hispana trad. Fernando de Diego. Caracas: La Casa de Bello, 1995. 46p. ISBN 980 214 115 1. 23cm. Dulingva. Poezia admono — inspirita de aŭtoroj latinaj — al la junaj nacioj amerikaj dediĉi sin al laboro agrikultura. 6,00 gld.

Almanako Lorenz 1998. N-ro 18. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1998. 95p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj spiritismaj. 9,90 gld.

Aŭstralia kantas sian historion. Tra-dukis Gaye Phillips k.a. Adelajdo: 82-a UK, 1997. 36p. 21cm. 34 kantoj kun muziknotoj. 4,50 gld.

Da Babilonia a Esperantujo. Considerazioni sulla lingua internazionale. Amerigo Iannaccone (1950). Itallingva. Venafro: Edizioni EVA, 1997. 66p. 21cm. Kolekto de artikoloj kaj leteroj pri Esperanto. 21,90 gld.

Erotika poezio en Esperanto. Kompilis B.A. Zozulja (1941). El diversaj lingvoj trad. Kalocsay, Belonenko, Golikov, Gusev, Fedotov. Rostov-Don: Verda Kukolo, 1997. 22p. 21cm. 3,90 gld.

Esperanto-rusa vortaro de 'falsaj amikoj de tradukisto'. Esperanto-russkij slovar "lojnih družej perevodčika". B.A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1995. 83p. 21cm. Kvarcento da kapvortoj. 7,50 gld.

Esperkanto. 6 kantoj de la poezia bukado de Bertram Potts, por 1 kaj 2 voĉoj kun piano. Suzanne Palmer-Holton (1949). Seaford: Palmer Holton Muziko, 1997. 25p. 30cm. Kun muziknotoj. 30,00 gld.

Fabeloj: Insulo de la milo da ridetoj / Bańnie: Wyspa tysiąca uśmiechów / Contes: L'île de mille sourires. Diversaj aŭtoroj. Red. Grażyna Maszczyńska-Góra. El la pola trad. Lidia Lięęza. En la francan trad. Uta Hrehorowicz. Kraków: Espero, 1996. 213p. ISBN 83 901363 7 6. 24cm. Koloraj ilustraĵoj de Sylwia Góra. Trilingva: Esperanta, franca, pola. Verkita de infanoj, kiuj ŝatas "fari malordon" en konataj, klasikaj fabeloj. 24,00 gld.

Fotografia fakvortaro kun perdiskede anglaj kaj italaj ekvivalentoj. Giuseppe Valente (1924). Triesto: Triesta E-Asocio, 1997. 38p. 21cm. Broŝuro kun disketo. Ĉ. 700 kapvortoj. 18,00 gld.

Hernani (2) (1830). Victor Hugo (1802-1885). El la franca trad. Georges Lagrange. Paris: UFE, 1997. 44p. 21cm. Dua parto de la plej fama, epok-fara dramo de la aŭtoro, ŝablon-rompa inaŭgurilo de la romantikismo en teatro. 13,50 gld.

Jen, denove. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Moskvo: Moskva Literatura E-Klubo, 1997. 24p. 21cm. Manpleno da poemoj originalaj kaj tradukitaj de la konata bardo. 6,00 gld.

Kongresa libro. 82-a Universala Kongreso de Esperanto, Adelajdo, 19-26 julio 1997. Rotterdam: UEA, 1997. 104 p. 21cm. 12,00 gld.



Post kelkara paŭzo SAT denove elpaŝas eldoniste, per verko kontraŭ maltoleremo.

Krakovo, legende kaj poezie ĉirkaŭblovita. Grażyna Maszczyńska-Góra (1947). El la pola trad. Lidia Lięęza. Krakovo: Espero, 1997. 63p. ISBN 83 906118 1 3. 24cm. Koloro ilustrita. Multflanka prezento de unu el la plej belaj urboj polaj. 18,00 gld.

Lasta amo de poeto. Versaĵoj. Libro tria (1958-1959). Georgo Deŝkin (1891-1967). Vieno: IEM, 1997. 26p. 21cm. Speciala numero de *La Dua Jarcento*. La lastaj poemoj de poeto konata pro siaj fruaj (1912) *Versaĵoj*. Unua eldono. 5,40 gld.

Risvoj de la traĭrado, La / I rischi della traversata (1987). Ĝerardo Vakano (1929). Dulingva. El la itala trad. Amerigo Janakono. Venafro: Edizioni EVA, 1997. 115p. 21cm. Simplaj, pudoraj poemoj, kiuj malkaŝas "korinklinon al la tero kaj al la familiaj amoj" (antaŭparolo). 24,90 gld.

Rusa-Esperanto-konversacilibro. Russko-esperantskij razgovornik. B.A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1995. 19p. 21cm. 3,60 gld.

Sezaranoj miaj fratoj! Michel Prodeau. El la franca trad. Christian Rivière. Nantes: la tradukinto, 1997. 163p. 19cm. Romano en kiu "francarabido el pariza ĉirkaŭurbo" perturbas per petolaĵoj la vivon en franca vilaĝeto. 25,20 gld.

Tegmentoj de Parizo, La. Dekduo da ideoj por vidi Parizon de supre. Marc Bavant (1957). Paris: Fédération Esperanto Ile-de-France, 1995. 30p. 21cm. Sprita turisto-gvidilo. 6,00 gld.

Tria ŝuo de Ĥruŝĉov, La. Sugestoj por privata kaj komerca intertraktado. H.-Georg Macioszek (1940). El la germana trad. Peter Weide. Pisa: Edistudio, 1997. 63p. ISBN 88 7036 070 9. 21cm. Konsiloj kiujn la esperantista aŭtoro ĉerpas el sia 15-jara sperto kiel intertraktisto dungata de entreprenoj kiuj malpaciĝas kun iu. 18,00 gld.

Vualo de l' silento (1990). Ĝura. El la franca trad. Henri Castiau. Paris: SAT, 1997. 168p. ISBN 2 9502432 4 X. 24cm. Aŭtobiografia verko: Juna kabilino estas mortkondamnita de sia familio, ĉar ŝi gravedas de franca vivkunulo. 27,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Kartludo: "Ursa familio". Esperanto Teachers' Association, 1997. 42 ludkartoj, plus instrukciaro. 11cm. Lingvolerniga, por infanoj inter 6 kaj 10 jaroj. 15,00 gld.

Kasedo: Amitaj, amataj, amotaj. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Moskvo: la aŭtoro, 1997. 90 min. Kantoj nostalgijaj kaj gajaj. Kun tekstokajero. 18,00 gld.

Kompaktdisko: Billy. Komputila ludo kun pli ol 150 ludniveloj. En Esperanto kaj 12 aliaj lingvoj. Kopenhago: Northwind Soft, 1997. Ne-perforta, amika ludo por minimume 5-jaraj infanoj. Tre fajnaj grafiko kaj son-efektoj, tridimensiaj figuroj. Parolo en Esperanto. Du niveloj de lingva facileco. Por IBM-kongruaj komputiloj. Hejmpaĝo: www.esperanto.dk/billy/. 54,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Kompaktdisko: Unu voĉo. Ewe-Calyptus. Adelaide, 1997. 61 min. Tradiciaj kantoj aŭstraliaj. Inkludas kajeron kun tekstoj kaj muziknotoj. 30,00 gld.


Ĝustigo

En "Laste aperis" (sep., p. 155) du eroj de la serio **Ludovikologia dokumentaro** estis priskribitaj kvazaŭ du volumoj de unu sama ero. En la realo temas pri:

Ludovikologia dokumentaro XXV. Invito al la ludovikologio I. Red. Ludovikito. Kioto: Ludovikito, 1997. 326p. 22cm. Kleraj "postbabiloj" al la volumoj aperintaj ĝis 1989. 72,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro XXVI. Invito al la ludovikologio II. Red. Ludovikito. Kioto: Ludovikito, 1997. 347p. 22cm. Kleraj "postbabiloj" al la volumoj aperintaj ekde 1989. 72,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



La kialoj de malgraŭo

Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj. Zlatko Tišljär (Pajo). Maribor/Zagreb: Inter-kulturo/Libro TIM, 1997. 177p. 21cm. 27,00 gld.

Sub provoka titolo la aŭtoro alportas artikolojn kaj eseojn el 35 jaroj da poresperanta agado: pri la e-ista popolo, pri siaj lingvosciencaj esploroj, kaj pri edukspertoj per E-o.

La unua parto analizas nian E-socion kaj la opini-evoluon pri ĝi ekde 1969. Tiŝljär diagnozas movadan mal-sanon: ĉien trudi la samideanojn lingve plej kapablajn, sed ofte organize nekompetentajn. Alia malsano estas diletantismo, kiu forpuŝas profesiulojn. Ambaŭ infektoj kune rezultigas diktatorecon de mezkapabluloj en Esperantujo, kiuj ĵaluze stumbligas verajn talentulojn. La nesufiĉan sukceson de Esperanto kaŭzas krome sektismo, manko de utiligo praktika — precipe komerca —, same kiel burokrataj malhelpoj kaj eĉ persekutoj. Savon vidas la aŭtoro en surmerkatoj de

Esperanto kiel valora varo helpe de esperantistaj entreprenoj.

En la rezonadoj de la aŭtoro mankas al mi emfazo pri la propraj fortoj de la e-istoj, kiuj ofte atendas venkigon de ekstere. Sed lingvon povas sukcesigi nur tiuj kiuj ĝin scias kaj uzas.

En la dua parto prezentigas unue frekvenc-vortaro kaj ties ellabor-metodo. Ne malpli interesaj estas la kalkuloj por difini kiomoble E-o pli facilas ol iu alia lingvo; objektiva argumentado pri tio ja postulas matematikan apogon. Tria artikolo, kun konkretaj rezultoj el lerneja eksperimentoj, koncernas la propedeŭtikan valoron de E-o kiel ideala lingva modelo.

La trian parton malfermas spertoj pri la fama Zagreba metodo, kies aŭtoro estas Tiŝljär. Sekvas rezonadoj pri denaskismo, ekspresaj kursoj kaj

dulingva edukado de infanoj. La aŭtoro konkludas ke edukado per E-o kreas internacieman, tolereman, pacaman personon, kiu pli facile lernas ankaŭ aliajn studobjektojn (ne nur lingvaj), sed samtempe povas suferi psikologie pro izoliteco en sia medio.

Domaĝe ke la aŭtoro ne resumis sian imagon pri la estonta vivo de “Esperanto malgraŭ la esperantistoj”, kiel promesas la titolo. Ties vorteton *malgraŭ* ja klarigas liaj analizoj pri niaj mankoj kaj eraroj, sed ne klaras el kio fontas ĝia optimismo. El la libro evidentas ke la e-istoj estas maldiligentaj kaj atendas de iu alia savon por la lingvo. Sed ja eĉ sen mono kaj oficiala beno e-istoj povas fari multon. Por sukcesigi en la lernejsistemo E-on kiel rimedon propedeŭtikan, necesas ellabori lernolibrojn de mondlingvoj bazitajn sur E-lernilo. Por surmerkatiigi Esperanton kiel varon, ni devas (kaj povas) prepari la kondiĉojn per kompilo de fakaj terminaroj — tasko multe pli facila nun pro komputila tekstoprilaborado kaj la ebla eldoni ilin, malpli koste ol libron, sur disketo. UEA planas bedaŭrinde nur kampanjojn por superŝuti internaciajn instancojn per propagandaj argumentoj, dum la necesaj leksikografiaj kaj literaturaj laboroj dependas nur de iniciatemaj soluloj, de neniu kunordigataj.

Miroslav Malovec (Ĉeĥio)

Familioj konkretaj kaj figuraj

Internacia familio — utopio aŭ realaĵo? Internacia Jaro de Familio — Simpozio. Red. Zlatko Tišljär. Maribor: Inter-Kulturo, 1995. 107p. 21cm. 15,00 gld. **Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo. Aktoj de la seminario okazinta 01-02.08.1996.** Div. aŭtoroj. Bratislavo: Esprima, 1996. 166p. 21cm. 15,00 gld.

Temas pri la aktoj de du aranĝoj, la unua okazinta (1994, Graz) kadre de la Internacia Jaro de Familio, la dua en 1996 ĉe la Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj (BICFS).

Internacia familio... konsistas el kontribuoj de simpozianto kaj ĝenerale ne pretendas sciencecon. Plej interese estas la lasta sekcio, “Esperanto-familioj” (pli ol la duono de la paĝoj), kies kontribuoj preskaŭ ĉiuj mem uzas Esperanton familie kaj ofte tre interese rakontas pri siaj spertoj.

Enkonduke Renato Corsetti bone analizas la motivojn de esperantistoj instrui sian karan lingvon al siaj infanoj spite la mokadon de la ĉirkaŭa

socio. Laŭ li, la Esperantlingva komunumo estas por multaj tiel esenca parto de la vivo ke, se ili ne transdonus la lingvon al siaj infanoj, tiuj neniam povus kompreni grandan parton de la vivo de siaj gepatroj.

Multkulturaj familioj... raportas pri samnoma esplorprojekto de BICFS kaj klare havas pli da scienca ambicio ol la alia verko.

Ĝia plej interesa ero, almenaŭ potencie, estas analizo de ampleksa enketo sendita al pli ol 200 esperantistaj familioj en tuta Eŭropo. Multaj el la enketo-rezultoj tamen apenaŭ surprizos esperantistojn — ekzemple ke ili ĝenerale ŝajnas toleremaj al aliaj popoloj, aŭ ke naciece miksitaj

geedziĝoj estas inter ili relative oftaj!

Krom la 8-paĝa analizo aperas — tre bonvene — ankaŭ 14-paĝa statistika tabelaro pri la respondoj. Tie jam surprizas, ekzemple, ke pli ol duono de la respondintoj neniam spertis kontraŭesperantan reagon ekster la familio. La enket-rezultoj certe povus konduki al pliaj interesaj analizoj, kaj oni povas esperi ke la plena materialo iĝos pli vaste alirebla, ekzemple per Interreto.

Krom la enket-esploro elstaras teksto de Nikola Raŝić, laŭ kiu Esperanto komenciĝis fakte kiel familia lingvo, se ne konkrete, do almenaŭ figure. Laŭ li, ĝuste la spirito de la “granda rondo familia” vivigis la lingvon kaj donis al ĝi elanon por plua ekzisto.

Precipe en la unua verko la kvalito de la enhavo estas do iom varia, sed la libroj multmaniere bone kompletigas unu la alian, kaj mi varme rekomendas ambaŭ al ĉiuj kiuj interesiĝas pri la problemoj de familia multlingveco.

Kalle Knivilä (Finnlando/Svedio)

Egalrajte en du kulturoj

Se ekzistas iu en la mondo de la 101-jara Esperanta teatro kiu ne bezonas nian prezenton, tiu estas Vida Jerman. Parolu do ŝi mem pri siaj 24 jaroj da profesia aktorado en Esperanto.

La 15-an de decembro 1993 mi festis du jardekojn da profesia aktorado en Esperanto, prezentante en la Zagreba Pupteatro la monodramon *Inventante ke mi sonĝas* de José Agustín. “Vida Jerman kontribuas al la plej vundebla, plej preterpasema kaj plej malfacile kaptebla arto... la parolata arto en Esperanto” — diris tiam enkonduke Spomenka Štimec.

Mian Esperantan ludadon mi komencis en 1973, kiel membro de la drama grupo de Zagreba Studenta E-Klubo. Sed en mia profesia vivo plej gravas la jaro 1986, kiam, por la Pekina UK, mi unuafoje preparis monodramon: *Flustro en uragano*, pri la japana eistino Verda Majo. Mi ne povas forgesi mian senton dum ludo por 2000 spektantoj en la plej moderna Pekina teatro, ĉar mian prezenton ĝuis homoj el 50 nacioj samtempe.

Tiu sperto instigis min fari unuan provon pri monodramo en mia gepatra lingvo: *Elekto de Tonka* de Miloš Macourek. Ekde tiam preskaŭ ĉiujare

mi preparas novan recitalon aŭ monodramon, unualoke en Esperanto.

La Havana UK (1990) havas apartan signifon por mi. Tie mi recitalis poemojn de Nicolas Guillén kaj ludis — kun Saša Pilipović — la komedion *Amo per proverboj* de Arturo Azevedo. Poemojn de Guillén mi deklamis



Vida Jerman post la prezento de *Inventante ke mi sonĝas*, en la 6-a Alp-Adria Konferenco (Triesto, 1994)

ankaŭ hispane, en la Nacia Biblioteko, en ĉeesto de la kulturministino. Sed la pinto de la okazaĵoj estis akcepto al kiu Fidel Castro persone invitis centon da gekongresanoj. Tie “Fidel... skribis amecan dediĉon... al Vida Jerman, aktorino kun malavara brusto” (laŭ la

portugala *Nia Bulteno*). La karismo de Fidel ensorĉis nin ĉiujn — sed li kisis nur min.

En la Valencia UK (1993) mi havis okazon prezenti, kadre de la Tago de la Paco, la libron *Izolulo*, kiu enhavas tradukojn de kroataj poemoj en 15 lingvoj, peritajn de Esperanto.

En novembro 1993, en la 8-a Internacia E-Festivalo (Parizo) tutmonde premieris *Inventante ke mi sonĝas*, kiun mi poste ludis ankaŭ en la 6-a Alp-Adria Konferenco (Triesto) kaj en la Seula UK (1994). Triesto kaj Seulo vidis

ankaŭ mian muzik-poezian recitalon kompilitan el poemoj de *Izolulo* kaj tri kanzonoj. En Seulo mi estis tre feliĉa pri la varma akcepto de mia duparta programo ĉe la publiko. Tamen, plej emociis min saluti la kongresanojn nome de Kroatio kaj danki pro la helpo donita el la Konto Espero al milit-suferintoj. Post Seulo mi gastis aktore en la IJK, postvivante prezentadon en malgranda teatro sen klimato... .

Post mia reveno, kroataj gazetoj rimarkis ke unuafoje la kroata poezio prezentigis pere de Esperanto kiel teatraĵo.

En la Internacia Arta Vespero de la Praga UK (1996) mi deklamis poemojn de Jaroslav Seifert. La jaron mi finis lanĉante, en la Zamenhof-tago, mian kasedon *Teatra vespero de Vida Jerman*, en Esperanta kaj kroatlingva variantoj.

La rakonteton pri miaj jaroj sur la verda scenejo mi provizore finas per la ĉi-jara, Adelajda UK, kie mi denove ludis *Inventante ke mi sonĝas*, memorigante recenzanton [sep., p. 151] pri “Claudia Cardinale siatempe”.

Mi finu per vortoj de Spomenka Štimec el la jam citita enkonduko: “Tiun entuziasmon, ploron, vervon kaj deprimiĝon Vida Jerman dividas kun du kulturoj, en kiuj ŝi egalrajte partoprenas: kun la kroata kaj la Esperanta. Ŝi forlasadas Zagrebon por partopreni en la monda kulturo, kaj ŝi forlasadas la mondon por reveni al Zagrebo.”

Vida Jerman (Kroatio)

Vervo kaj perfekto

Teatra vespero de Vida Jerman. Zagreb, 1996. Kasedo 72-minuta. 24,00 gld.

La kasedo enhavas la muzik-poezian recitalon *Izolulo* — trafan elekton el la kroata poezio — kaj brilan prezenton de *Inventante ke mi sonĝas*, monodramo de José Agustín.

La 21 poemoj de *Izolulo* jen romantike elvokas la kroatan historion, jen prikantas naturbelaĵojn, jen ardas pri amo aŭ priskribas artisme la militite detruitan Kroation. Vida Jerman recitas kun granda vervo kaj en perfekta Esperanto. Sed ŝia elokvento kaj multjara sceneja sperto evidentiĝas plej bone en la monodramo, kiu ebligas al ŝi plene elmontri la tutan gamon de la aktortalento per kiu ŝi kaptas la atenton kaj la koron de siaj aŭskultantoj.

Al la art-amantoj mi rekomendas ĉi tiun sonkasedon aparte taŭgan por societaj kunvenoj kaj etaj grupaj renkontiĝoj, sed ankaŭ por izoluloj sopirantaj aŭdi recitalon aŭ teatraĵon en bona Esperanto.

Ivo Borovečki (Kroatio)

Per- sone



• Minnaja: Premio Pirlot

Ĉiujare la senato de Akademio Internacia de la Sciencoj aljuĝas la Premion Pirlot al scienca verko kies enhavo estas almenaŭ duone en E-o. La premion en 1997 ricevis, laŭ decido dum AIS-studsesio en Rimini (30 aŭg.-5 sep.), Carlo Minnaja, pro sia itala-Esperanta vortaro, ampleksanta pli ol mil paĝojn. *Vocabolario italiano-Esperanto* furoras malgraŭ sia alta prezo (120 gld.): UEA sola vendis jam 46 ekzemplerojn.

Proponojn por la venontjara Premio Pirlot akceptas AIS-senatano prof. Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio. (Interredaktore)

• Novobilský: Invitita al Havel

Laŭ iniciato de la ĉeĥa prezidento Václav Havel kaj la verkisto Elie Wiesel, la internacia konferenco FORUM 2000 kunigis en Prago (3-6 sep.) sesdek da elstaraj personoj el la tuta mondo por pritrakti la staton de la monda civilizo kaj la minacojn al ĝi. La oficialan malfermon ĉeestis ankaŭ diversaj ĉeĥaj invititoj, i.a. Vlastimil Novobilský, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato en la Praga UK (1996). Unu el la plej elstaraj ideoj dum la konferenco estis tiu levita de Helmut Schmidt, eks-kanceliero

de Germanio, laŭ kiu UN devus akcepti, paralele kun la Ĉarto de Homaj Rajtoj, Ĉarton de Homa Respondeco. La proponon preparis 26 politikistoj, i.a. Jimmy Carter kaj Simon Perez.

Ĉar Wiesel invitis tem-proponojn por daŭriga konferenco (1998, Prago), Novobilský intencas proponi kiel temon problemojn de la homa komunikado, de universala lingvo ks.

• Oesterheld: E-ista "eternaŭto"

La mondfama argentina scenaristo de bildstrioj, Héctor G. Oesterheld, plej konata pro sia serio *El eternauta* ("La etern-naŭto"), estis esperantisto kaj esprimis en siaj verkoj esperantistajn idealojn. Tion konfirmis familiaĵoj de la artisto, malaperinta dum la diktatora epoko. (*Antaŭen — ¡Hacia adelante!*)



Fragmento de *El eternauta*, de Héctor G. Oesterheld kaj Solano López

Loke



• Argentino: Eleganta Esperanto

Elegantega restoracio kaj danckalo, kun internacia menuo, malfermiĝis lastan majon en Bonaero (Calle Migueletes 1944, kvartalo Belgrano). Ĝi nomiĝas Esperanto. (*Antaŭen — ¡Hacia adelante!*)

• Bosnio: Hospitalo kuracota

Dank' al Sebastia Ribes, esperantista sekretario de la urbestro de Santa Perpétua de Mogoda (Katalunio), ek-estis kunlaboro inter tiu urbo kaj la bosnia Teŝanj. Instigon donis pledo de Senad Čolić, prezidanto de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) — dum siaj prelegoj en Katalunio en januaro 1996 — por diversigi la helpon

al Bosnio, ĝis tiam donitan precipe al Sarajevo. Delegacio el Santa Perpétua kun esperantista interpretanto informiĝis fine de 1996 pri la bezonoj en Teŝanj, kaj la kataluna urbo decidis disponigi por riparo de hospitala tegmento 10 milionojn da pesetoj (ĉ. 134 mil gld.), sumon kiun ĝiaj reprezentantoj poste sukcesis komplementi per naŭoblo el aliaj fontoj. La projekton en Teŝanj administras La Espero, homhelpa organizaĵo de Sarajevaj esperantistoj kun salajrataj membroj.

Pri ĉi tio kaj multo alia informas la unua numero de *Bosnia Lilio*, gazeto de ELBiH, kiun "solidare eldonas" Kataluna E-Asocio. (Subrena abonprezo estas 10 gld., pagebla al la UEA-konto "kaea-b".)

• Brazilo: Ĉe polico kaj prizono

Fine de junio, la 92 lokoj de la Esperanto-kursoj anoncitas ĉe interlerneja lingvo-centro en la ĉefurbo Braziljo montriĝis nesufiĉaj por la 239 interesatoj. 12 lokoj el la 92 estis fine

donitaj al instruistoj dezirantaj pliklerigi sin.

La Akademio de Civila Polico de la Federacia Distrikto proponas — pionire inter la policaj institucioj de Brazilo — 134-horan E-kurson de aŭgusto 1997 ĝis junio 1998. (*Gazeta Academica*)

La spiritistaj grupo kaj biblioteko en malliberejo de ŝtato San-Paŭlo organizas Esperanto-kurson, al kiu aliĝis jam 20 prizonanoj. Revuoj kaj libroj por ilia studado estas sendebaj pere de la adreso de José Alexandre Alcoléa (Mat. 105629, Av. Ataliba Leonel, 656, Carandiru, São Paulo — SP, CEP 02033-000). (*A Voz de Espírito*)

Ĝustigo

La teksto titolita "Eŭropa agado: Demando al la Komisiono" (majo, p. 99) kredigas ke la studgrupo starigita en Bruselo estas eŭropa iniciato — erare, ĉar temas pri iniciato tutmonda.

Wim De Smet (Belgio)

• **Hungario:**
“Dua” lingvo — deknaŭa

Laŭ la libro *Társadalom és nyelvhasználat* (“Socio kaj lingvouzado”, 1995), Esperanto estas en Hungario la 19-a lingvo laŭ scipov-ofteco (situanta post la greka kaj antaŭ la finna). Se oni konsideras nur ne-denaskajn parolantojn, Esperanto okupas la 15-an lokon, post la ĉeĥa kaj antaŭ la bulgara. (B. Wacha)

• **Kroatio: Monato movad-mova**

Aŭguste pli ol 160 e-istoj el 15 landoj kunestadis en pluraj aranĝoj kroataj: krom la 19-a Renkontiĝo de E-Familioj kaj sekva feriado (okt., p. 169), la lando gastigis la 4-ajn Somerajn Kursojn en Motovun (Istrio), organizitajn de Višnja Branković, kaj en norda Kroatio seminarion pri “La virino en la Esperanta literaturo”, kiun gvidis Spomenka Štimec. (S. Štimec)

• **Kubo: Sidejo meblenda**

La E-grupo en la centro de Havano akiris novan sidejon ampleksan, kiun riparis e-istoj mem. Ĉia helpo al ĝia meblado estas bonvena, por ke la loko ekfunkciu ne nur kiel lernejo, sed ankaŭ kiel centro por la E-kulturo. Kontakto vicdelegiton Juan Lázaro Besada, Gervasio 62, ap. 3, 2do piso, Entre Lagunas y San Lázaro, CU-10200 Ciudad Habana 2, Kubo.

• **Nederlando: Kiom en 2006?**

Laŭ la agadraporto de la landa asocio Esperanto Nederland pri la jaro 1996, ĝia membraro en unu jaro mal-kreskis de 626 al 595 (-5%). Preskaŭ duono de la membroj aĝas pli ol 70 jarojn (la meznombra aĝo superas 66 jarojn), kaj nur 38 anoj junas sub 40 jaroj. Sekretario Ineke Emmelkamp (mem inter la 100 plej junaj) demandas maltrankvile: “Kiom da membroj ni havos en la jaro 2006?”

• **Taĝikio: Universitata klubo**

Novbakitaj esperantistoj, kiuj finis 30-horan kurson de Firdaus Ŝukurov, fondis klubon ĉe la Ŝtata Medicina Universitato en la ĉefurbo Duŝanbe. Virektoro Firuz Ŝukurov gratulis ilin kaj certigis pri la favoro de la universitata estraro. En la fondkunveno i.a. Natalija Kasymova (vd. majo, p. 94) rakontis pri sia tre fruktodona vojaĝo al kvin eŭropaj landoj. Fine ĉiuj ĥoris kantojn de diversaj popoloj sub la gvido de Kasymova. (K. Tasabi)

• **Arto: Bildoj por Tata**

Endre Dudich, vicprezidanto de Hungaria E-Asocio, malfermis la ekspozicion “Bildoj por Tata” de la esperantistaj artistoj Rita kaj Franz-Georg Rössler, kiu videblis en Tata (Hungario) de la 7-a ĝis la 25-a de aŭg. Esperanto-grupoj en Hungario estas invitataj kontakti la geedzojn Rössler por starigi ekspoziciojn en aliaj urboj. (*Eventoj*)

• **Ekologio: Amikoj de la Tero**

La belga sekcio de “Internacio de Amikoj de la Tero” (Friends of the Earth International) ekuas E-on kiel internacian komunikilon. Ekde nun aperas E-rubriko en la sekcia bulteno, redaktata de José Vinck, delegito pri ekologio (rue de Moha, 5, BE-5030 Gembloux, Belgio). (*SAT-Amikaro*)

• **Ĝemelurboj: Post la milito**

Esperantistoj de la urboj Pécs (Hungario) kaj Osijek (Kroatio) dum jardekoj flegis ĝemelurban kontakton — ĝis la milito. Rekontaktiĝo okazis, post pluraj provoj, fine de majo, kiam la loka Esperanto-societo Liberiga Stelo gastigis du reprezentantojn de la hungara ĝemelurba societo, kiuj venis por diskuti pri kunlaboro. (*Eventoj*)

• **Historio: Pri GDREA, ĝis 2000**

Fondiĝis laborgrupo pri la historio de Esperanto-Asocio en la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (GDREA), cele al libro eldonota antaŭ 2000. Interesatoj turnu sin, specife por ricevi tiuteman cirkuleron, al d-ro Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, 12683 Berlin, Germanio). (*Esperanto aktuell*)

• **Lingvistiko: Esploroj varbataj**

Pere de subteno de FAME-fondaĵo, la japana kaj itala esploristoj HIROSHI Nagata (Universitato de Okayama) kaj Renato Corsetti

ANONCETOJ

Glitkalkulilojn (kalkulbastonojn) kaj kalkuldiskojn serĉas pensiita termezuristo por sia modesta kolekto. Ankaŭ libroj bonvenaj pri la temo. S-ro A.M. Molen, Goudenstein 15, NL-3772 LA Barneveld, Nederlando.

Letervespero. Omaĝe al Allan Kardec, pri la 141-a datreveno de la lanĉo de *La libro de la spiritoj*, okazos letervespero en la 18-a de aprilo 1998, kiu kunigos studentojn de Esperanto de pluraj spiritismaj institucioj. Respondo garantiata. Skribu amase al: Centro Espirita Bezerra de Menezes, Rua Maia Lacerda 155, BR-20250-001 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

(Universitato de Romo, Italio) komencis psikolingvistikan esploron pri la proceso de Esperanto-lernado ĉe divers-fonaj kaj -nivelaĵoj lernantoj. Principe, ili esploras specimenon 120-personan: po 10 komencantojn, progresantojn kaj spertulojn kun la angla, eŭska, persa kaj rusa kiel gepatra lingvo. La esploroj devos prijuĝi la gramatikecon de iuj frazoj kaj verki priskribon de ricevita bildo. Anoncu vian partoprenemon al Renato Corsetti (Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎/☎+39/6/957-57-13; ✉corsetti@itelcad.it).

• **ZEO: Placo de komerc-ĉambro**

La urbestro de Bar-le-Duc (Francio, 20 mil loĝantoj) decidis nomi la situejon de la loka Komerca kaj Industria Ĉambro “Placo de d-ro Zamenhof, patro de Esperanto”. (*Espéranto-Ile de France*)

Antaŭa direktoro de la koncerna Ĉambro estas François-Xavier Gilbert, estro de Koresponda Servo Mondskala.



Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)

ILUSTRITA DOKUMENTARO PRI 1044 ZAMENHOFF/ESPERANTO-OBJEKTOJ EN 54 LANDOJ
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Juan F. ALCHERA (1915-1997), delegito en 25 de Mayo (Argentino) kaj fakdelegito pri radioamatorismo, forpasis la 2-an de julio.

Jorge Pablo BONDONE (1930-1997), delegito pri gastigado kaj tangomuziko, forpasis la 1-an de aŭgusto en Córdoba (Argentino).

Pierre COLLINGE (1925-1997) mortis la 7-an de septembro en Rock Forest (Kebekio, Kanado). Lerninte Esperanton en 1976, li gvidis E-kursojn ĝis emeritiĝo en la Universitato de Sherbrooke, kie li profesoris. Li prezidis Kanadan E-Asocion (1982-83) kaj servis en Sherbrooke kiel delegito pri instruado, juro kaj lingvoscienco.

Mehmed JAKUPOVIĆ (1915-1997), e-isto ekde 1932, forpasis la 7-an de oktobro en Rijeka (Kroatio), kies E-societon li prezidis. Li estis funkciulo de Serbia, Kroatia kaj Jugoslavio E-ligoj, dumviva membro de UEA, delegito pri lada industrio, kunorganizado de kongresoj de IFEF kaj de SAT.



Enrique Kohei

Enrique KOHEI (1921-1997), esperantisto ekde la komenco de la 40-aj jaroj, UEA-membro de 1945 kaj pli ol 40 jarojn delegito (pri instruado kaj informado), mortis meze de septembro en Venado Tuerto (Argentino). Li agadis kiel komitatano de Argentina Esperanto-Ligo, dum pluraj jaroj redaktis ties organon *Argentina Esperantisto*, organizis multajn ekspoziciojn kaj funkciis kiel la argentina peranto de *El Popola Ĉinio*. Li aŭtoris la baznivelan lernilon *Ne krokodilu plu...!*, instruis Esperanton en la Universitato de Rosario kaj gvidis multajn E-kursojn diversloke. Eĉ malsana, en siaj lastaj vivmonatoj li aktivis por la projekto "Infanoj en la mondo".

Betty LARSEN (1906-1997), sekretario de la asocio Jogo en Esperanto, tradukinto de *Natura nutrado* (1966)

NGUYỄN Hải Trùng (1921-1997)

Honora Membro de UEA ekde 1993, NGUYỄN Hải Trùng forpasis komence de la jaro en Suda Vjetnamio.

Poeto, pentristo, Nguyễn estis esperantisto ekde 1937. Li kunfondis Vjetnaman Pacdefendan Esperanto-Asocion en 1956, estis ties komitatano kaj membro de la Honora Patrona Komitato de Vjetnama E-Asocio. Li gvidis multajn kursojn kaj signife kontribuis al la disvastigo de Esperanto antaŭ kaj dum la jaroj de VPEA.



NGUYỄN Hải Trùng

kaj *Kiu posedas Danion?* (1989), mortis la 10-an de majo en Aalsgård (Danio).

Ross G. ROBBINS (1919-1997), dumviva membro, kiu vicprezidis (1953) Nov-Zelandon kaj prezidis (1962-63) Aŭstralian Esperanto-Asocion, mortis la 1-an de julio en Cleveland (Aŭstralio).

Angel TODOROV, UEA-komitatano (1978-89) kaj ĉefdelegito de Bulgario (1983-87), estrarano de Monda Turismo, forpasis la 21-an de aŭgusto.

Francisco ZARAGOZA RUIZ (1910-1997) mortis la 13-an de majo en Callosa de Segura (Hispanio), kies E-grupon li fondis tuj post sia esperantistiĝo en 1932. Inter la junuloj kies E-lernadon li instigis, estis la konata redaktoro kaj verkisto Antonio Marco Botella. De 1939 ĝis 1955 Zaragoza vivis ekzile en Belgio, kie li kunlaboris kun la lokaj E-grupoj. Reveninte al Hispanio, li aktivis precipe post la fino de la Franco-reĝimo, kiel hispania sekciestro (1976-86) kaj internacia vicsekretario (1979-85) de ILEI. Li aŭtoris la lernilojn *Esperanto — lingvo por ĉiuj* kaj *Perfektiga kurso de Esperanto*, kiuj varbis centojn da lernantoj.



Francisco Zaragoza Ruiz

OFICIALA INFORMILO

DONACIOJ 1997 (NLG)
ĝis la 30-a de septembro

Fondaĵo Ameriko: Dum UK-kunsido 40,41. Brazilo: M.P. Almada 26,50. Usono: M. Kennedy 78,60. Sumo ĉi-jara 2380,64.

Fondaĵo Azio: Japanio: H. Hotta 65,80; K. Gotou 65,80; K. Kosaka 32,90; S. Mitukawa 32,90; K. Syozi 164,50; T. Ueda 32,90. Sumo ĉi-jara 5713,51.

Fondaĵo Canuto: Institucio Hodler 3000,00. Aŭstralio: J.R. Bishop 100,00. Belgio: F. Sperber 25,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Francio: Y. Vienne 100,00. Germanio: L. Mahn 13,00. Kanado: S.T. Norvell Jr. 75,00. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Turkio: S. Katircioglu 11,20. Usono: W.R. Harmon 10,00; L. Harmon 18,00. Sumo ĉi-jara 6272,27.

Ĝenerala Kaso: Brazilo: M.P. Almada 196,50. Francio: M. Feneyrol (por Societo Zamenhof) 3330,50. Svedio: S. Fjordland 153,37. Sumo ĉi-jara 6952,96.

Konto Espero: Anonime 16,55. Sumo ĉi-jara 2763,76.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: J.R. Bishop 100,00. Francio: A. Gaillard 188,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Germanio: L. Mahn 13,00. Nederlando: N.C. Kuiterman 25,00. Usono: L. Harmon 10,00. Sumo ĉi-jara 1055,98.

Volontula Fondaĵo: Institucio Hodler: 2000,00. Aŭstralio: J.R. Bishop 30,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Germanio: L. Mahn 13,00. M. Westerman 10,00. Nederlando: N.C. Kuiterman 25,00. Usono: L. Harmon 50,00. W.R. Harmon 50,00. Sumo ĉi-jara 3078,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

RIKOLTO DE 50 JAROJ


PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindekde miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. —

Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto.

Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorecenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!



INTERESKAPTA LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Studo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologian evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologian ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

KAJ PLUE...

POR POLITIKO DE ESPERANTO. A. Ĉiti-Batelli. Pledo por tuja ekago kontraŭ lingva hegemonio. 23p. Prezo: 4,80 gld.

Sama en la angla: **A POLICY FOR ESPERANTO.** Prezo: 4,80 gld.

Sama en la franca: **POUR UNE POLITIQUE DE L'ESPÉRANTO.** Prezo: 4,80 gld.

KIEL ĈIUJ KATETOJ. A. Usakiewicz. Ilustr., plenkolora. Ok rakontoj por legi kaj kunĝui familie. Eld.: KLEKS. 64p. Prezo: 24,00 gld.

FRANZ SCHUBERT – MUZIKA ALBUMO. Plenkolora ilustrita vivrakonto de la fama komponisto por (ne nur) infanoj. Eld.: KLEKS. 28p. Prezo: kun KD (60 min.) 54,00 gld.; sen la disko: 30,00 gld.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefona: +31 10 436 1044 Telefaksa: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

DRILLING BILLY

KOMPUTILA LUDO
KUN PLI OL
150 LUDNIVELOJ

EN ESPERANTO KAJ 12 ALIAJ
LINGVOJ. 54,00 GLD. TRIONA
RABATO EKDE 3 EKZEMPLEROJ.
VD. "LASTE APERIS", P. 195.

HEJMPAĜO: WWW.ESPERANTO.DK/BILLY/.



INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis
60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1998...

Esperanta Antologio. La plej impona kolekto de originalaj poemoj. 900p. Bindita. 60 gld. **24 gld.**

Ni kaj ĝi. Eseoj de Waringhien pri religio kaj arto. 346p. 45 gld. **18 gld.**

Nova Esperanta krestomatio. Moderna antologio de E-literaturo. 510p. Bindita. 57 gld. **33 gld.**

Infoduktoj. Pri la komputila revolucio. 142p. 19,50 gld. **9 gld.**

Faktoj kaj fantazioj. Marjorie Boulton. Renoma progresiga legolibro. 431p. 36 gld. **18 gld.**

La arbo de la sciado. Filozofia romano de Pio Baroja. 222p. 24 gld. **12 gld.**

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. John Wells. 76p. 15 gld. **9 gld.**

Kantoj kaj romanoj. La famaj ampoemoj de H. Heine. 381p. 39 gld. **18 gld.**

La danĝera lingvo. Ulrich Lins. Studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto. 546p. 66 gld. **39 gld.**

Studoj pri la Internacia Lingvo. En Eo/angla/franca/germana. 155p. 24 gld. **18 gld.**

Tiu ĉi oferto validas ĝis la 31a de dec. 1997.
Mendojn bv. adresi al la Libro servo de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendokostoj je 10% (minimume 5 gld.) kaj, por loĝantoj en EU, imposto je 6%.

ANONCU EN JARLIBRO 1998!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	125 gld.	250 gld.
Duona paĝo	225 gld.	455 gld.
Tuta paĝo	415 gld.	825 gld.
Kovrilpaĝo	825 gld.	1650 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1998.

SIMPLE LA PLEJ BONA!


SESA ELONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Transpontu la atendon

Jam temp' estis
pensi
pri la UK...



... kaj glufirmi viajn kovertojn per la nova kongresa glumarko. 51x34mm. Blua-flava-verda. Folia kun 32 markoj: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.